– “La klarigisto ne stias akuzon kontraŭ la Nazaretanod; la komisiita rabeno ne trovas maljuston en li!” diras li kaj liaj okuloj fajreras malbon-awgure; lia votŝo sonas alte kaj rawke pro bridata pasio. “Temas pri viro, majstro law onidiro, kiu kompleze interrilatas kun pekantoj kaj ne kondamnas et adultulinon. Tŝu ni trovu tion detsa? Viro nomizas sin «Lumo de la mondo» kia estas nur Jehovo; Li sola. Tŝu ni ne admonu pro tio? Por tiu viro indas neniun: ne unu el la Printsoj inter la pastraro, ne Farisajo, ne Sadukano, ne klerulo, kiujn li tŝiuj sakriledŝe kaj kalumnie kuradŝas kfalitizi kiel «hypokritulojn». Tŝu oni trovu en tio neniun akuzon? Viro nomizas sin «Filjo de la Patro» senpere estidŝinta el Ties sino. Neniun inter vi povu tion noti en raporto kiel blasfemon kaj maljuston? Estimataj Membroj, estas alia viro, rabeno law ofitso, kiu kunkulpas en la malkonstrua agado de tiu fisemisto, kiu iradas kaj semadas la semojn de tia ribelego, kia enmanigos al la paganaro povon super la Dia Popolo; kiu donatsas sian favoron al la fisemisto; kiu estas tute malfi-

dela al Israel kaj preferas honori novan diulon!”
Sarea malparolas.

Estas vizadĝoj kiuj nur stivole alrigardas la akuz-
iton; plimulto tamen ardas pro malamo. Kelkiuj
membroj ekstaras, pretaj por ancoraw pliamasigi
la vitson da riprotŝoj. Sed ili silentas, tŝar la
akuzito mem sin levis kaj serene, kfazaw
aperante en tutordinara diskutokunveno, kun
digna aplombo superrigardas tŝiujn.

– “Jehovo metu ardantajn tŝarbojn sur miajd
lipojd, por ke ili parolu puran veron; Jehovo
verŝu santan oleon en la orelojd de miaj
honorindaj awskultantoj, por ke la sono de mia
votŝo penetru dŝis en ilia menso; Jehovo estu
benata en eterno!” Tiele komentsas Joram, kaj la
tŝeestantoj residigas sin tŝiuj, atendente. Tiam la
retoristo dawrigas:

– “Niaj originaj gepatroj perdis la paradizon. Kaj
Jehovo parolis al la delurinto: «La idaĝo de la Vir-
ino distretos al tsi la kapon.» Al Abraham
promesis Jehovo: «En vi estos benataj tŝiuj gene-
ardĝoj de Tero.» Kaj Jesaja tsertigas: «Li venos por
[...] liberigi el mornaj kavernoj tiujn, kiuj sidas en
mallumo.» La Baptisto apud Jordano, la profeto,
predikis relevidĝon el la peko. Vi do ne miru,
Honorindaj Viroj el Jeruzalemo, ke la Homo pri
kiu oni diras: «Li posedas mesiajn etsojn,» volas
re-starigi pekantojn. Tŝu la serpento ne disprem-
atu? Ke la Homo, kiun oni montras kiel la Sant-
oleizitan, nomizas sin «Lumo de la mondo»,
spirita lumo kiu permesos al la idolana mondo
trovi sekuran vojon. Ke la Homo, nomizata Kristo
fare de multaj, apelas al atesto de «la Patro Kiu

sendis Lin» kaj ankaw de Si mem, kiel Sendito. Tŝu la homoj ne fidu je Kiu agas en la nomo de la Sinjoro? Ankaw ne miru, Honorindaj Viroj, ke tiu Homo nomizas Jehovon «Sia Patro», tial ke en la dua psalmo Jehovo signas la Redžon kiun Li sur Sion, la santa monto, enofitsigis «Sia Filjo» kaj en Samuel Li nomas non Ŝolomo ankaw «Sia Filjo» kaj en la Eliro la genton de Israel denove «Filjo de Dio», samkiel Dewteronomo aldonas «generita fare de Dio».

Mi komprenas: estas malfatsile toleri ke iu awdatsu nomizi nin «hypokrituloj» kaj «filjoj de la demono». Sed ni enpensigu nin, respektindaj Adžuloj de Israelujo, kaj ni klinu la kapojn. Vidu, tiu-tŝi Viro veas super nia nejusto. Se Li efektive estas la Mesio, dum ni malaktseptas Lin, tŝu tiamdo Li ne estas prava? «Kiam vi awdas la votŝon de Dio, ne opstinigu viajn korojn» kantas la nawdek-kfara psalmo. Stiu, se Li estus la Mesio kaj ni kredus je Li, tio estus nia savo! Tiam la kredo levus nin d is la Altetso de kie Li venis. Mi tremas tŝe la penso, ke ni ostratsifus Lin dum Li posedas la Veron. La Vero, tiu plej alta potentso en la mondo, kiu disdonas kreskon kaj forton kaj kiu kondukas al savanta liberidžo: la spirita liberidžo. Tia liberidžo ja konsistigas la mision de la Santoleifito. Kiu ancoraw rifuzos tion-tŝi kredi!?”

– “Jen trovizdas la kerno de via tuta argumentaro, kaj ni tŝiuj stias: tiu fundamento estas falsa!” deklaras Sarea kun emfazo. “Vi estas mal-fidela al la kutimaro, malfidela al nia partio, malfidela al nia kredo, al Jehovo. Vi ja mem

konfesas tion!”

– “Traditsio kaj partio ne faras kredon, respektinda Majstro. Ni ne rajtas perdi nin pro partio. Ni ne rajtas suferi malritŝon en la animo, por materie ritŝigi la partion. Mi, kiel homo, estas pli ol la partio. «Mi» estas eterna; mia partio kiel tŝiuj partioj estas portempa. «Mi» restos; dži pereos! Aw tŝu ni tŝiuj estu malagnoskantoj pri la Eternetso?”

– “Ankaw nia partio estas eterna!” nun asertas *Rabi Rifar*. “Tŝu dži ne estas vokita de Jehovo por regadi kun la Mesio super la mondo en tŝiuj tempoj? Jenon diras Daniel: «Kaj tŝiuj gentoj, triboj kaj lingvoj Lin servos; Lia potentso estas eterna potentso.» Nur la unika partio al Jehovo fidela, la nia, regados kune kun Li! Tŝi-maniere do, utilante al mia partio, mi utilos al la Eternetso.”

– “Se ni envere estas 'hypokrituloj' kaj 'filjoj de la demono' kaj Li envere profeto kaj Mesio, tŝu ni do, law Liaj paroloj, ne apartenos al la herbetoj inter la tritiko, kiujn oni brulos for aw al la malbonaj fiŝoj en la reto, kiujn oni žetas for?”

– “Tŝar li ofendas la Adžulojn de Israel, la gardistojn de la Kredo je Dio, mi stias ke li nĕ estas la Mesio!” kriaŝegas Potifar.

– “Nu nu, *Rabi*,” reprenas Joram. “Vi kredas kion vi ŝatas kredi. Jen la granda eraro de nia partio. Dži metas ne Jehovon kaj Lian Veron en la tsen-trod, sed sin mem kaj sian propran opinion. En la komentso ne estis tiel. De komunumo de Dikredantoj dži transformidžis al kasto de partikredantoj. Ni idžis erarvaganta Ŝafaro, anstataw

Dion aspirantaj samreligianoj!”

– “Ekster nia partio neniu savo!”

– “En nia partio: egoetso; neniu sopiro al Jehovo!”

– “Nia partio volas gardi Jehovon kiel sian natsian Dion.”

– “La vera Dio estas Patro de tŝiuj homoj.”

– “Via Galilujano malaktseptas nian elektitetson. Li strangolas nian *sersoparimon!”

– “Ne en Ŝirio, Edžiptujo, aw Romenujo Li iradas.”

– “Kün via galilea mesio tŝio estos perdita!”

– “Kun Li tŝio estos reakirebla!”

– “Ne! Via Nazaretano malamas nian partion!”

– “Sole la malbonon en dži.”

– “Nia partio ne estas malbona, tŝar populara!”

– “Dži ne metas la homon super la popolod.”

– “Dži estas la ununura natsia!”

– “Ne estas justa por la homoj!”

– “Dži staras roke firma por tŝiuj tempoj!”

– “Dži ne estas firme bazumita sur spiritaj, universalaj, kaj eternaj valoroj.”

– “Perfidanto estas vi, kiu adoras homan estažon!”

– “Mesio ne estas Dio.”

– “La via tamen nomizas sin 'Filjo de Dio'.”

– “Metafore!”

– “For kun la perfidanto! La false žurinta! For kun li!”

– “For kun Joram!”

– “For!!”

Tŝi-lastaj krioj, rawke eligitaj unue de Sarea, poste ripetatas de multaj. Tuta la kunsido eksaltis kaj trudas antawed. Oni amasigas sin tŝirkaw

Joram, lin premeĝas, puŝeĝas dĵis ekstere.
Tie li falas. Dre li la pordo klake fermatas.
Sarea atingis sian tselon: ŝantselidĵemaj
membroj sin jam gardos sekfi la spuron de
Joram!



Tŝe Komplotantoj

Apud Lago Ginesareto, en la urbeto Tiberias, lodžas Izboret, la olivokolora komertsisto, markizita per la plej akra inter tŝiuj aktsipitraj vizadzatŝoj. Kion tiu-tŝi Galiluj-ano primartŝandas, neniu povus ekspliki per du vortoj. Jen lia var-tenejo estas plena je altaj stakoj da linfibroj kaj da lano; la postan tagon venas karavano de kameloj kaj la sakoj ekvojadžas kune al Tyros. Baldaw poste Izboret swingas unu el siaj tro longaj gamboj trans siad arabad tŝevalod kaj rajdas al Damasko. Ŝtalajn klingojn li portas hejmed. Kelkajn tagojn poste tiuj jam estas survoje al Jeruzalemo. Fadenbulojn, hejme ŝpinitajn de galil-ujaj kaj pereujaj virinoj, li atŝetas amase kaj teksigas el ili mantelojn, jupojn, kaj zonojn, kiuj senprokraste translodžidžas al Sidon kaj aliaj urboj apud la Granda Maro. Izboret stias kie rubenoj kaj smeraldoj estas atŝeteblaj en Ŝirio, kaj liveras ilin al la butikoj en Jeruzalemo.

Izboret faras bonajn negotsojn! Tiajn li faras. Multajn Denarojn li posedas. Sed ankaw Talentojn, pri tio tsertas tŝiuj. Tŝu li ne estus ritŝa? Jes ja, li devas esti ritŝa! Kial li ne montras tion? Kial li ne atŝetas domojn, ne bienojn? Tio stias neniu. Sed, ke li kapablas tion, neniu neas. Kaj tŝiuj tŝedas ke li estas nek fanfarena, nek aroganta. Tial li restas amiko de ritŝuloj kaj malritŝuloj.

Ofte proksimigas sin al lia domo viroj, pri kiuj neniuj stias kion ili venas praktiki tie. Strangaj viroj el fremdaj regionoj: el Galilujo, el Pereujo, el la foraj lokoj de Judeujo. Tiuj malmulte parolas kun li eksterdome. Ili restas etan horon en la interno, solaj kun li, kaj tiam ree foriras. Oni asertas kelkafoje, ke la uloj estas armizitaj.

Tšie oni vidas non Izboret. Tšie kie amasigas sin la popolo. Li posedas bonan trot-beston. Kiam ie ekestas malpatso pri religiaj aferoj, tiam li kontemplas la tumulton, sidante sur sia tševalo. Mem disputi li ne volas; nur alrigardi. Se du najbaraj viladĵoj komentas troki agiton unu kun la alia, tiam Izboret stipovas rakonti pri dži, ne law onidiro sed law propra opservo. La ĵuslastajn du jarojn li estis treege okupita pro la alfluado al la Profeto el Nazaret. Preskaw tšiujn mirigaĵojn li tšeestis: la sanigojn, la malsortŝojn, la kuregon de posedataj porkoj al la lago, kaj la kfietigon de tormo sur la lago. Li mandžis el la multobligitaj pano kaj fiŝoj. Li awskultis sepoble dek predikojn. Li estis kun la Profeto en Jeruzalemo, apud Jordano, en Sidon. Tšu stivolema viro? Aw kio alia? Tšu religiema viro? Jes, tia li sendube estas. La synagogo de Tiberias favore rilatas al li. Tawga viro. Vigla viro. Lert-ulo. Kaj iu kiu stipovas oportune paroli kaj... silenti. Strangulo.

Tše tiu Izboret, en la verda Galilujo, lodžas nun Joram. Majstro Joram el Jeruzalemo. Joram ne estas armizita. Joram ne venis por unuhora vizito kaj posta foriro. Joram nun jam de multaj tagoj restadas tše Izboret. La rabeno ne estas kašemulo. Li mem diris: “Mi venas al Galilujo por

ripozi.” Li estis latsa pro la multa disputado, pro la multa tserbifado. Profundaj sulkoj misornamas lian frunton. Latsa li estas kaj nervema. Li longe estis perforte bremsinta sin en Jeruzalemo, sed la naturo postulis sian tributon: ripozon. Sole Izboret stias ke Joram elkuris la Santan Urbon. Tie oni tro multe klatŝis pri li. Membroj de la Alta Konsilio. Kaj tiuj evitadis lin. Subrigardis al li. Efektive koleraĵ. Kaj tiele Joram eksitidŝis; tial – ne pro timo, sed por eviti konfliktojn kaj por regajni sian egalpezon – li fudŝis la malafablan non Sion. Li stiis ke Izboret volonte gastigos lin. Kaj li iris. Ankaw pro insistado de Edisa, kiu postrestis. Tiam Joram donis al ŝi du fortikajn gardist-ojn. Nokte ili zorgas ke la filjino kaj ties servist-inoj povas dormi trankfile kaj ke la vilao restas sekura kontraŭ fiaĵ vizitantoj.

Nun jam estas du semajnoj ke Joram mallaboradis kaj promenadis lawlonge de la Lago. Kaj kontempladis la bienojn verdidŝantajn, tŝar sorbitajn de la pluvo, kaj la malproksiman nedŝan verton de Monto Hermono. Li idŝis pli serena je pensoj kaj prijudŝas nun eldistantse la maldŝojajn okazintaŝojn dum la Tendarfesto kaj en la lando, rilate al la Nazaretano. Sole kun Izboret li foje interŝandŝas ideojn. Ambaw viroj estas konvinkitaj ke la Viro el Nazaret estas eminenta figuro, ke Li devas esti la promesita Mesio. Sed la galiluja komertsisto kredas ke por Jesuo jam estas veninta tempo por transiri al politikaj elpaŝoj, alivorte ke Li fine komentsu elpeli la Romenojn. Estas Lia vokidŝo, devas esti Lia granda vokidŝo. La Judeano male opinias et pli netsesa ke la

Mesio fondu regnon de la spirito. Jes ja, Izboret iomgrade tsedu, ke regas grava religia kaj morala malordoj en la Popolo de Dio. Tio estas redžustigenda. Kaj Joram siaflanke ankaw ne kapablas kontraŭdiri non Izboret, kiam tiu tsertigas ke la Promesito devos esti «Redžo». Post multe da interparolado la du unuanime atingas detsidon: ili stretšos siajn fortojn por igi la popolon proklami Jesuon el Nazaret redžo. Tiu-tŝi redžo povos poste en sia surtera regno muldi profunde religieman popolon.

En la sekfanta mateno Izboret lasas sian gaston sola. Al neniu homo li malsekretigas la tselon de sia vojadžo. Lia araba *kwotŝevalo direktas la kapon alnorde. Ne longe. Baldaw dži deiras aloktsidente. Post tio alsude. La semistoj sur la freŝaj kampoj, la nartsisoj, bluaj irizoj, kaj kaktroj lawlonge de la deklivoj, ili ne interesas lin. Trote la irado kondukas supred kaj malsupred de la montetoj. Dum horoj. Nur en Pella, en la Teritorio de la Dek Urboj, li haltas. En eksterurba gastejo la rajdinto enstalgigas sian tŝevalon. Li dawrigas piede. Trankfila, malgrava vojadžanto en griza survesto, kun vojadžosako kaj bastono. Je ordinara, izolita dometo li anontse frapas.

– “*Aliolaban, Mathan!*” – ”*Aliolaban, Izboret!*”

La domomastro vivas sola. Li estas frawla, samkiel Izboret.

– “Tŝu la fidela mesadžisto havas spetsialajn stiigojn?”

– “Mi alportas unu Talenton por la movado, mastro. Krom tio restadas tŝe mi hejme viro, kiu povos servi al ni: Membro de la Alta Konsilio.”

- “Tŝu li estas varbita por la Liberets-Partio?”
- “Ano li ne estidĝos. Mi etŝ ne volas instigi lin al tio. Joram tro opstine tenas je propraj ideoj; kiel tŝiuj rabenoj tsetere. Sed li estas utiligebla por la redĝisma agado.”
- “Juna? Maljuna?”
- “Apenaw sesdekjara.”
- “Tŝu li ne havas propran ambiŝion kontserne la Mesietson?”
- “Ne.”
- “Kion li do deziras?”
- “Multe da homoj por triumfe enkonduki nian Profeton en Jeruzalemod. Tŝu ni helpos?”
- “Konsentite!”

Kune ili ancoraw priparolas rimedojn, lokon, kaj tempon.

– “Izboret, kiel tŝiam, viaj informoj kaj mono estas bonvenaj. Venontan fojon ne venu tied-tŝi. Gardu vian komertsistan trompmantelon. Vivu la Liberetsopartio; vivu la Zelotoj! La liberigo el sub la malamataj okupantoj proksimigas sin. *Aliolaban, Izboret!*”

– “*Aliolaban, Mathan!*”

La tempo por detse finfari negotson estas forpasinta. Izboret, la silentema, fanata informagento de la Zelotoj, kiujn oni nomizas ankaw *lestes* aw rabistoj, iras aliloked por atŝeti lanon, teksaĝojn, gemojn, kaj... armojn.



Mathan estas intriganto. Por li Izboret estas instrumento. Li, estro de la sekreta partio en la

lando, soifas al potentso kaj ludas filudon. Persone ritŝa je mono, li rolas kiel mizerulo, vivotenas sin per teksado kaj brokantado de tenda tolo kaj lodžas en modesta dometo. Sed iam li okupos palatson, kiam la elkreskanta partio estos sufitŝe forta kaj la tawga momento veninta por pafi siajn sagojn. Multaj, li stias, jam pereis en batalado kontraŭ la okupantod, sed li estas prudenta, ne mem agos impete kaj maloportune, sed li taksos kaj pesos kaj lasos aliajn homojn tiri la maronojn el la forno. Ha, tiu onidira profeto el Nazaret! Tiu estas kapabla. Tiu akaparos milojn da adeptoj. Nutras eble kaŝan intentson. Ni opservu lin kaj lasu lin faradi. Lin subtenu. Lin helpu supred grimpi dĵis la kulmino de potentso. Proklamigu lin redžo kaj mesio. Ludigu lian grandegan influon kontraŭ la Romenoj. Kiam li estos en funtsio kaj la malamikoj en fudžo, ha, tiam estos mia vitso! Tiam vi malaperos, Galilujano, foriros senbrue, kaj mi ekokupos vian lokon. Mi regados, per forto, per la devigo de armoj. Mi tiam nomizatos redžo. Venu Izboret, venu vi tŝiuj, fanataj Liberetsopartianoj! Mi rekompentsos vin por viaj servoj, jes, se vi restos fidelaj al mi. Venu kaj portu al mi viajn Talentojn. Mi povos ilin uzi. Venu kaj konduku al mi novajn anojn kaj kunsentantojn. Klarigu al mi viajn proprajn planojn kaj aspirojn. Mi utiligos ilin por mia tselo, kiel detsas al tŝefo.



Joram plu ne ripozas. El atestanta buŝo li kolektis informojn pri la Nazaretano: en Nazaret tŝe Ties propra parentsaro pri tribo kaj origino; en Kapernaum kaj najbaraj viladĝoj, tŝe okul-atestantoj, pri Liaj grandaj miraklofaroj kaj Lia doktrino. Ekster dubo: tiu Profeto tutserioze volas restarigi la popolon. Etŝ por fondi surteran regnon la tereno estas sufitŝe preparita. Li povos lardĝe disfaldi Sian potentson. Elpeli la fremdularon. Tiam kun plena forto kaj rapide realigi Siajn piajn reformizojn, establi Sian eternan, judan regnon por savo de la mondo.

Tŝi-tiam Joram aperas en la synagogoj. Kiel Membro de la Alta Konsilio li estas tŝiam bona kaj oni invitas lin paroli. Li diskursas pri la religia regno kaj pri Jesuo, Kiu estas la vera Mesio.

En Tiberias la homoj levas la ŝultrojn. La postan Ŝabaton li estas en Magdala kaj oni huas lin. Tŝe Ginesareto oni krudatŝe pelas lin el la synagogo. En Xorozajin oni estas sertŝonta ŝtonojn por ŝeti al li; sed tŝi-tie felitŝe ekkaptas lin Izboret kaj haste forkondukas sur sia tŝevalo.

– “Kio okazas, Izboret?”

– “Kelkaj fidelaj viroj fervore aligos sin al vi, Rabi. Viroj kiuj apogos kaj aplawdos vin en la kunsidoj, kiuj kuntrenos la amason serve al vi, kiuj volas ekmarŝi post vi.”

Joram, law indiko de Izboret, elsertŝas en Kapernaum kelkajn admirantojn de la Nazaretano; kunvenigas ilin kaj konvinkas ilin. En la Ŝabato li instruas en la synagogo.

– “Jesuo el Nazaret, la Mesio, estas nia redĝo!” li

krias. Kaj vidu, dek viroj entuziasme aklamas. Dudek aliaj vokas aprobe. Tuta la kunveno konsente jubilas.

– “Jehovo trovizdas en Pereujo. Ni iru kaj kronizu Lin!” blekas iu. Kaj multaj estas tuj pretaj.

Ili ŝip-veturas trans la Grandad Lagod kaj proksimigas sin al Pereujo.

– “Rabi, kio estos nia rekompentso?” demandas iu kunulo. Kaj senprokraste la demando ripetatas el kfindek avidaj buŝoj.

– “La honoro de Jehovo, la gloro de nia Redžo, kaj la grandetso de Israel, sufitŝu al ni!” respondas Joram.

Por ili ne estas sufitŝe. Monon kaj honor-ofitson ili deziras. Ili albordigas la rabenon kaj velas returne al sia urbo.

Sur la plawdejo atendas Izboret, sidante sur sia trot-besto. Li jam komprenas la situaŝion, sed lasas Joram rakonti sian travivaĝon.

– “Granda tselo postulas monon!” rimarkigas la komertsisto. “Tiu-tŝi popolamaso postulas kompenson. Donu al dži monon kaj multe da promesoj kaj rekompentso.”

– “Amo por la nobla entrepreno devas gvidi nin. Ne profitamo,” opinias Joram. “Tiel estis tŝe Gideon, tŝe la Makabeoj, kaj tiom multe da aliaj.”

– “Ve, tiel estis, sed plu ne estas! La okupadanto estas metinta degeneron en la popolon de Dio” funebras Izboret.

La galiluja komertsisto adiaवास. Lin atendas negotso en Hippos, diras li.

Joram direktas sin al Jordano. Rekte tra Dek-Urbujo li vojadžas. En plu neniujn sinagogojn li mal-

fermas la buŝon. En Pella li ekstias ke la Nazaretano ankoraŭ vagas en Pereujo. Tŝu li sertŝu la Profeton kaj antaŭmetu al Li sian planon? Ne-firma pri sia detsido li sekfas la Jordan-valon. Iun Ŝabaton li etapas en la unua viladĝo de Pereujo. La superulo de la synagogo demandas tŝu unu el la fremdaj gastoj volas afable paroli al ili la bonan vorton. Joram rezistas la rigardojn direktitajn al li kaj restas silenta. Juna viro kun longaj pendantaj hartufoj paŝas al la katedro. – “La Regno de Dio estas veninta kaj Jesuo el Nazaret estas la promesita Mesio,” starigas li.

Ne estas la unua fojo, ke la tŝeestantoj awdas tiun aserton, kiu ja tsetere ne forte tuŝas ilin. Pli volonte ili vidus Jesuon mem verki sanigojn en ilia viladĝo.

Post la kunsido Joram alkrotŝas la parolinton. Tiu akompanatas de sia frato, kiun li nomizas Tadjus. Li mem nomizatas Jakobus kaj estas Nazaretano.

– “Vi sertŝas la Profeton, *Rabi?*” palpas Jakobus.

– “Ho, volonte mi kondukus vin al Li, Kiu elsendis nin por rikolti. Tŝu ankaw vi volas kredi je Li?”

– “Mi kredas, ke Li estas la Santoleifito de la Sinjoro!” agnoskas Joram.

La fratoj montras sin ege felitŝaj. Entuziasme ili rakontas pri sia intima parentsetso kun la Profeto: iliaj gepatroj estas frato kaj fratino de la gepatroj de la Mesio! Jesuo estas la plej potentsa inter tŝiuj profetoj de Israel! La naturo obeas Lin, malsanoj tŝedas, demonoj fudžas, etŝ la morto maltenas sian kaptazon antaw Li. Li estas

supermezure granda, admirinda kaj bona!

– “La Alta Konsilio ne agnoskas Lin.”

– “La Alta Konsilio estas antawjudža. Vi almenaw, Majstro, ne faligas detsidon law ekstera ŝajno, sed vi judžas law justetso. Vi almenaw konfesas Lian altan personetson. Vi defendas Lin brave kontraŭ tŝiujd trompitajd Farisajojd kaj trompantajd Sadukanojd. Lawdon al vi, kaj dankon al la Tŝielo, tŝar jenon mi stias: Li estas el Dio. Ja mem Dio!”

– “Mesio!” rektigas Joram tuje. “Sendito de Jehovo, Andželo de la Alta Kunsido. Ne Dio!”

– “Dio!” murmuris la du samtempe, kaj ili rigardas en la spatson respekt-plene, kfazaw en rapidžo antaw vizio, kiu luras kaj lumigas iliajn spiritojn.

– “Kiel vi povas diri tion pri via propra frato!?” miras la rabeno. “Tŝu vi estas Hebreoj, aw paganoj? «Mi sola estas Dio, kaj neniu alia estas ekster Mi.», diras la Sinjoro.”

– “Li mem tsertigas: «Estas el Dio ke Mi eliris, kaj ke Mi venas».”

– “Prave Li diras tion. Mi awdis el Lia buŝo: «Por doni pri Mi ateston Ni estas du (du, vi awdas?): Mi kaj la Patro, Kiu sendis Min.» Kunsekte Li estas nur Sendito de la Patro, de nia Dio en la Tŝielo.”

– “Li mem instruis al ni: «Vi devenas de mal-supre, Mi devenas de supre; vi apartenas al tiu-tŝi mondo, Mi ne apartenas al tiu-tŝi mondo.» Neniam elidžis mensogo el Lia buŝo!”

– “Jes, ni estas tro mond-inklinaj, Li ne estas tia. «Mia doktrino ne estas de Mi» diras Li; «Dži estas

la doktrino de Tiu Kiu sendis Min.» Tiamaniere Li distingas inter Si mem kaj Jehovo, la Patro.”

– “«Mi estas la Komentsidžo,»” instruas Li.

– “Tre dĵuste: la komentsidžo de nova, pli bona epoko.”

– “«Vi mortos en viaj pekoj, se vi ne kredos kiu Mi estas» minatsis Li, Kiu tamen estas tiel doltŝ-anima.”

– “Mi kredas, ke Li estas la Mesio,” jesas Joram. “Sed vi, junviroj, ŝajnas maldĵuste kompreni Lin. Preterlasu ofendi Jehovon, predikante idoladoradon. Diru al via Majstro, ke Li estu prudenta pri Siaj paroloj, kaj klara, ankaw por simpluloj; tserte Li ne volas la vendĵon de Jehovo super Sia vokitetso. Diru al Li, ke venis la tempo por proklamigi Sin kiel Mesion, kaj santoleifi kiel Redĵon de Israelujo, por restarigi la regnon de Jehuda kaj dawrigi Sian taskon de morala purigado de la Gento de Dio.”

La du fratoj idĵis silentaj. Klare parolas maldĵojo el iliaj vizadĵoj. Ili sentas sian senpovon por diskuti kun la rabeno. Ili sentas kiel tiu-tŝi viro ne estas kia ili. Kun melanoxolemo en la koro kaj granda sopiro je kuradĵigo far-de la Majstrego, ili iras for.

Joram postrigardas ilin. Li skuas la kapon. “Naiv-uloj,” grumblas li. “Simpluloj kiuj ne komprenas la lingvon de sia Majstro. Kiel tiom multaj ili kredas tion kion ili ŝatas kredi. Ili, tŝar ili estas parentsoj de la Profeto Jesuo. Tio igas ilin blindaj. Samkiel Sarea estas blinda pro malamo, kaj Filok pro mensa misformizo. Estas tŝio paganismo; influo de tiu damnita

paganismo!”




Joram aligas sin al karavano kiu migras suded law la freŝa Jordano. Kiam vesperidžas, la vojadzantoj sertŝas ŝirmon sub la tendoj. Joram volas peti rifudžejon de neniu. La volonte oferatan gastamon li evitas. Li volas resti sola. En li estas urdžo al meditado, kiun li esperas trankfiligi en soletso. La nokto estas sufitŝe malvarmeta sed seka. Joram paŝas al la rivero kaj sub salikarbo, profunde klinante sin al la vatro, li sternas sin en la tŝeborda kano, volvite en kovrilo kaj kaptuko. La silentaj steloj okulifas, Luno serioze opservas Teron. Joram rigardas supred kaj sondas la profundon de la tŝielvolbo. Liaj pensoj flugas al Jehovo en la Alto. Kaj subite malsupred-idžas al la Homo, kiun Jakobus kaj Tadajus nomizis Dio.”

Kiel sensentse! Li, frato en la hometso estus nia Dio!? ... Pri tiu homo la Skriboj do atestus: «La Tŝielo, etŝ ja la plej alta Tŝielo, ne kapablas ampleksi Lin.» Kaj aliloke: «Al Jehovo apartenas Tero, kun tŝio kion dži entenas.» Kaj kion ni vidas: tŝarpeniston de ordinara aspekto, sen havažo. Tŝi-tiu estu «la Dio de niaj Praavoj, la Reganto de la Regantoj; granda, potentsa, kaj timiga.» Homo estas la Nazaretano! Se li estus Dio, tiamdo ni tŝiuj devus adore premi vizadžon al grundo, lawdi lin, dankadi lin kaj glorizadi. Por tiu homo estus konstruita nia Templo kaj establita la Oferdona Servo! Por li estus la

džojkantoj; por li la festoj! Tiu homo estus kreinta kaj puninta non Adam, vokinta la patriarxojn, gvidinta Moseon, apoginta non David kaj lumiginta la profetojn! De li la Ledžo sur Sinai, la ritŝo kaj sadžo de Ŝolomo, la puno por Sodom, Babel, kaj Saul! De li la promesoj al Israel, la helpo en tŝiu dandžero! Ho, Jehovo; se etŝ la simplaj kaj fidelaj sekfantoj de Via Sendito volas estigi novajn diojn kaj hereze emas al paganismo, kiel ega tiamdo estas la konfuzo en Via popolo! Sinjoro, Dio de Abraham, ne permesu ke la intentoj de la malitsuloj prosperu! Sinjoro de la Tŝieloj, ne toleru ke ilia insido suktsesu! ... Tŝionpova, faru ke 'Li' ne estu Dio! ... Ho, mi ... mi jam ne stias kion mi predžas... Jena viro, Via Mesio, ja ne volas esti Dio... Via adoptita Filjo Li estas, Via Sendito, je Kiu mi kredas..."

Joram malmulte dormas tiun nokton. Tŝiufoje denove la du fratoj aperas en lia spirito: iliaj naiva kredo kaj ilia nuda stultetso. Ne, per tiaj viroj la Mesio ne povas fondi Sian Regnon. Bezonatas helpo de pli gravaj aŭtoritatuloj, de homoj influhavaj kaj konvinkipovaj kaj krome... multe da mono. Sole en Jeruzalemo tŝi-tiaj helpantoj estas trov-eblaj, sole en la medio do de la Alta Konsilio.

Ju pli Joram tserbifas, des pli kreskas en li konvinko ke li devas reiri al Sion, por trovi en la Santa Urbo personojn kaj rimedojn subtene al la Mesio kaj Ties tasko.



Fiaj Swatantoj

La konfidentsulo de tŝefpastro Kajafa vagas en Pereujo, de synagogo al synagogo. Inspektovojadĝo, tio nomizatas. “Karaj aŭtoritatuloj, vi devas senrezerve informi min. Tŝu la popolo restas fidela al Jehovo, tra tŝio? Tŝu la homoj grandnombre iradas al la Templofestoj? Tŝu ili firmvole loktenas kontraŭ la fiflorantad paganismod?”

Nature: oni konversas pri la Nazaretano. Li ja estas en la regiono kaj tŝiu laborigas sian langon. En tiu afero Sarea ne montras sin entuziasme por aŭ kontraŭ. Jesja, li dēvas esti kontraŭ, tŝar la tuta Altkonsilio estas tia! Sed li neniel emfazas, kfazaw persono preferanta atendeman sintenon.

Sarea tamen stias kion li volas. Akre li registras tŝion, neniun parolo eskapas. Li migras de viladĝeto al viladĝeto, fidele postsekfante la spuron de la Galilujano, dum la langoj estas ancoraw malrigidaj. Li konas tŝiujn admirantojn de la 'profeto'! Sed et tio ne estas lia pretsipa intentso. Li volas ekkoni la Zelotojn kaj la... rilaton de la Nazaretano al tiuj-tŝi aktivaj militantoj kontraŭ la Romenoj.

– “Alportu pruvon, *Rabi Sarea*, ke la malamegato vivas en interligo kun tiu sekreta organizaĝo, kaj via rekompentso estos egala al tiu netaksebla servo, diris la tŝefpastro. Tŝar, se ni suktesos brulstampi la tŝarpentiston kiel liberetsparti-

anon, tiam estos infana ludo poreterne fermigi al li la buŝon pere de la Romenoj. Bedawrinde, ni plu ne stipovas fari tion per propra aŭtoritato.”

La spiono jam posedas monton da informoj. Detsidan argumenton li ankoraŭ ne havas.

Ke Rabeno Joram restadas en la teritorio de Pe-reujo, li stias. «Tŝu ankaw tiu...? Vidu, se tio estas pruvebla, kiu stias se tiamdo la tuta havaĝo de la ritŝa komertsisto falus kiel rekompentso en miaj d manojd?» Dum siaj semajnojn longaj vojadĝoj Sarea multe tserbifadis; ankaw pri Joram. Avido al ties ritŝaĝo swarmas en lia koro. Kaj li estas ruze kalkulinta; kunmetinta planojn. Li ŝandĝos sian konduton vid'al la opstina sed naiva kolego. Rekonkeros lian fidon. Tiam ne malfatsile estos igi la malkaŝeman viron konfesi, se li apartenas al la sekreta partio. Tiam la rabeno falos en liad potentsod. Liaj posedaĝoj kiel rekompentso aw... kiel aldoniĝo al la bela filjino por Jodus. Kia perspektivo! Edisa por lia filjo Jodus! Sarea jam dĝojegas en sia koro je la penso. Tiu geedzidĝo unubate puŝus lian parentsaron al grava rango! Kiel alted tiamdo ankoraŭ povus levidĝi lia influo! Apartenante al la brantŝo de David, li aw lia idaro iam povus aktseptigi sin en la rondo kiu regos kun la Mesio super la mondo!...

La entuziasmo de la plan-kovanto iom malardas, kiam li ekpensas pri la tŝefkomizo kaj ditŝiplo de Joram, pri tiu Irad. Jes, Irad...? Tserte la ritŝa heredontino tentas ankaw ties okulojn! Nature pro la ŝmiraĝo. Jen la tŝenero kiu katenas non Irad al lia mastro. Jen la fonto, kiu igas lin

hypokriti kaj aprobi opiniojn pri la Nazaretano. Pro tiu doto la servisto estas simila al filjo kaj pretsizema en la komertsado, ankaw kiam forestas la mastra kontrolo. Tŝu pretsizema? Tŝu vere pretsizema, tiu Irad? Monavida jesja! Tute tserte tia! ... «Je la Trezoroj de Sion, Irad, sur tsia meandra vojo tsi foje renkontos non Sarea! Joram persone devos detsidi al kiu apartenu lia filjino. Perfidanto; verŝajne tsi makulis mian famon tŝe tsia mastro! Je la Templo! Atŝa sklavo, ankaw mi kapablas imiti romenan radon sulkantan tra la ŝlimo. Ankaw mi povas ŝprutsigi koton sur tsiad robod! Kaj gajni non Joram! Tŝu tsi konas non Sarea!?»

Ankoraw sub la impeto de siaj projektoj, la Sadukano neespektite trovidžas antaw Joram. Lia detsido estas tuj farita. Jen alveninta la oportuna momento! Nun!

Kun amika dĵojkrio li aliras la estintan kontrawulon. Senhaste malpliidžas lia aferemo kaj baldaw ekvibras sentemaj kordoj.

– “Tŝi-tie, malproksime de la jeruzalema disputado, mi ekkonis mian eraran sintenon rilate al vi,” li mielas. “Lojala kaj malkaŝema viro, etŝ se li estas kontrawulo, meritas tŝian respekton. Lawdata estu la Dio de niaj Prapatroj, ke Gi degnis lasi al mi tempon por trankfila pripensado. La Sinjoro vere favoras min, tŝar ni plu ne staras tiel foraj unu de la alia. Amiko via mi deziras esti, pli volonte ol malsadža oponanto. Kio estas pli malgaja ol tiu tŝiama tŝikanado! Mia koro estas kfazaw pasero funebranta sur la tegmento; mi volas rebonigi mian avanan miskonduton. Ke la

Tŝielo havigu al vi kaj mi abundon je tagoj, por ebligi al mi uzi tutan mian influon je la tŝefpastro, por rehonorigi honestan sadžulon kiel vin en la altaj medioj. Tŝu vi aktseptas mian manon, *Rabi*?”

– “Nenion pli arde deziras mia koro!” tsertigas la bonvola Joram tute sintsere.

– “Al la Tŝielo kaj al vi estu danko, Majstro! Stiu ke mi jam forte inklinas al via tezo kontserne la Mesion. Volonte kaj kun plena atento mi esplorus kune kun vi viajn klerajn argumentojn tiurilate. Tŝu vi ne faros al mi la honoron ilin elmontri?”

Kion povas respondi Joram al tiu džentilega komplezo? Tŝu li ne devas entuziasme ekkapti tiun-tŝi unike belan ŝantson por doni al sia propra projekto plenuman komentson? Džoja li montras sin. Kaj sian starponton li volonte disfaldos lardže por Sarea, dum la longa vojadžo al Jeruzalemo, kiun ili kune entreprenas.



Unu semajnon Joram estas reveninta tŝe Edisa, reveninta al sia magazeno, reveninta ankaw en la kunsidoj de la lernigistoj. Li sentas ke Sarea aplikis balzamon: la insidaj rigardoj malmultidžis, denove li estas tolerata en la superaj medioj kaj alparolata de Farisajoj kaj etŝ de Sadukanoj. Tio felitŝigas non Joram.

Nun li povas trankfile repensi pri siaj propraj aferoj. Post lia reveno, Irad enmanigis al li konsider-indan sumon, kiu konsistigas la gajnon pro far-itaj transagoj. La komertsisto lawdas la

komizon pro ties skrupuletso. Li eknotis ke la rigardoj de la junulo avide postsekfas la staturon de Edisa. Li stias kion signifas tio. Ke la ditŝiplo ancoraw ne sendis peranton por swati ŝian manon, tion Joram altributas al hontemo aw al iom da mal-indetsosento. Tiu detenemo efikas tŝe la rabeno kiel rekomendo, same kiel la severa lojaletso, pri kiu li estas tserta. Plivole ol al iu ritŝa famulo, li ne rifuzos sian konsenton al ditŝiplo kiun li mem estas formizinta.



Posttagmeze de griza pluva tago en la monato, kiun la Hebreoj nomizas Kislev, Sarea ekfrapas tŝe Joram. Edisa kondukas la synhedranon tra la vestiblo kaj invitas lin bonvole iomete atendi en apudaŝejo. Dume ŝi vekos sian patron.

– “Tŝu mia amiko, la granda majstro, estas ripozanta? Ho! Tiukaze estu la afabletso mem, tŝarma infano, kaj ne dŝenu lin. Mi havas tempon.” ŝajne naive Sarea baras la pordon, tiel ke la knabino ne kapablas eliri.

– “La patro volonte interrompos sian sieston por ritsevi estimatan amikon,” tsertigas Edisa.

– “La Tŝielo imputu al mi, se mi vekigos latsan lernigiston,” detenas ŝin Sarea. La kunesto de la mastrino en tiu-tŝi domo estas al mi agrabla kiel la frukto de la datlopalmo. Lasu al la patro lian ripozon, mi petas!”

Sarea estas tre komunikema. Li babilas pri la bonaj negotsoj de la komertso de Joram. Li babilas pri siaj propraj infanoj kaj montras sin pret-

sipe fieri pri sia ege instruita filjo Jodus, kiu estas bona kiel vino el Damasko, obeema kiel etulo, milda kaj afabla en sotsieto kiel gaja Edžipto. Inter tŝiuj junaj Jeruzalemanoj li sendube estas la plej lerta en komertsaj aferoj.

Edisa awskultas kun multe da bona volo, sed ne komprenas kial tiu-tŝi alt-ofitsa Sadukano emas resti tiel longe kaj intime en akompano de juna virino kia ŝi.

Felitŝe la patro awdis la fremdsonan viran votŝon kaj li venas por konduki for la babilemulon. Kio gvidis tied-tŝi la konfidaton de la tŝefpastro? Edisa estas stivola kaj restas proksima al la tŝambro, kie ŝi subawskultas la du rabenojn konversadi jen lawte jen duonvotŝe.

Nun ili parolas pri Irad.

– “Tŝu vi fidas lin?” demandas Sarea.

– “Plene!” respondas ia patro sen hezito.

– “Jes... do... li tute meritas vian fidon?”

– “Mi neniam trovis iun malhonestetson en li,” diras la patro.

– “Tiu junularo tamen... Sed nu, fido estas fido, tŝu ne?”

Restas silente tie interne, kaj Edisa konjektas ja ke ŝia patro tserbifas pri la paroloj de la vizitanto.

– “Sarea!” ŝi awdas la patron diri, ”la bonaj paroloj el via buŝo jam gajnis al mi la favoron de multaj altaj membroj kaj la danko pro tio sonoras el mia koro kiel trumpetsignalo en la Templo. Sed ancoraw pli mi estus via ŝuldanto, se viaj lipoj bonvolus esprimi kion pensas via klara menso pri mia servisto.”

– “Efektive, amiko, mi volonte estus al vi utila.

Sed via natura sadžo komprenas: la rilato inter vi kaj Irad, via estonta bofiljo eble, estas afero kiu ne kontsernas min. Pardonu min se miaj paroloj eble elvokis suspekton. Tio ne estis mia intentso!” – “Mi ritsevis neniun peton por la mano de mia filjino, Sarea. Sed se Irad tiel dezirus, tiamdo etŝ pli estus beno por mi esti informita pri li. Parolu, mi petas!”

– “Ho, neniel mi volas nomizati intriganto, amiko. Je via insistito tamen mi sentas la devon doni pli detalan klarigon. Sed ne tro grave taksu dĵin! Mi nur awdis iam de flankpersonoj ke oni kulpigas non Irad pri posedo de objekto kun dubinda deveno. Kredeble pura kalumnio. Vi ja tsetere povus fatsile trovi firman pruvon pri lia honest- etso, funde eksamenante liajn transagojn dum la tempo de via foresto.”

– “Tion mi faros, Sarea!”

Edisa suktseŝis sekfi la dĵeneralan temon de la interparolado.

– “Tiu Irad!” ŝi murmuris. ”Mi neniam konsideris lin kun favoro. Liaj okuloj ne rigardas honeste. Jes Patsjo, vi bone trasertŝu lian elkalkulon. Vi tserte malkovros ion, tuttserte vi malkovros ion!”



Ŝia patro ne estas urdĵema. Malgraw tio la paroloj de Sarea vekas en li iom singardan atenton, kiam pliposte en sia urba butikio li vidas non Irad kiel tŝefkomizon aferanta. En la junulo, kiu sentas sin opservata, Joram kredas rimarki

embaraseton. Imagon verŝajne. ”Tŝiam li estis tre eksakta!” li riprotŝas sin mem. Li tamen ŝetas rigardon en la kontifadod kaj zorge komparas enspezitajn sumojn kun valoro de la venditaj artikloj. Kaj... li malkovras erarojn. Law lia opinio tro malkare notitaj enspezoj. Li pridemandas non Irad rilate al la vendoprezo de ebur-ornamita juvelujo.

– “Tre dŝuste, Irad. Kaj kiu sumo estas registrita tie-tŝi?”

– “La sama sumo, Mastro.”

Joram kontentigas sin nur kfazawe, tŝar la tsiferoj estas malnete formizitaj. Sur la vizadŝo de Irad li ekvidas nefatsile bridatan maltrankfilon. Ankoraw pli da tiaj malbone legeblaj registraŝoj li trovas. Por elkalkulado de la totalsumo oni aditsis per la pli malgrandaj tsiferoj. Kunsekte Irad ne transdonis la tutan negotsosumon! Tŝe la unua demand-esploro li kapitulatsas. Honte li mallevas la kapon.

La trompema servisto forsendatas senprokraste kaj ankaw kiel ditŝiplo malagnoskatas.

Tŝu Sarea tiel rapide informatas? Baldaw post tio li aperas en la butikoj, akompanata de sia filjo Jadus. Kaj tŝu Joram ne havus bezonon pri fidiinda komizo en sia prosperanta negotso? Mallonga estas la intertrakto kaj Jadus rajtas okupi la lokon de Irad jam la sefontan tagon.

– “Kaj jenon mi povas diri al vi, Joram: en Jadus vi eventale posedos pli honestan kaj dŝentilan bofiljon ol en la alia!”

Sarea diras tion dre la mano kaj lawte ridas kfazaw dŝi estus spritega ideo.

En la vespero Joram komunikas la novaĵon al sia filjino. Ŝin pleje trafas la lastaj paroloj de Sarea. Senmove ŝi revetas pri ili.

– “Jehovo gardu min kontraŭ nod Sarea kiel bo-patrod!” ŝi predžas en sia koro.



Jadus estas afabla juna viro. Alta je statur, li swingas sin vigle kaj elaste tra la butikoj. Lia rufblonda kapo sur gratsia kolo nete konturidžas kontraŭ la buntaj elmontraĵoj. Li estas okulfrape diligenta kaj servema kiam aperas lia mastro. Por tŝio li havas intereson kaj akre stretŝas siajn grandajn orelojn. Dum foresto de Joram li ŝovas sian pezan aktsipitran nazon en tŝiud vazod. Ordinaran vendadon li lasas al la malsuperaj komizoj, sed ritŝe aspektantajn klientojn li servas persone.

– “Sin kaŝas granda kapitalo en tiu-tŝi bazaro,” opinias li. “Mia patro stiis kion li faris, puŝante min tŝi-interned. Ba! la filjineton de Joram mi jam prenos kiel aldonan premion!”

Li ridetas. Li ridetas la tutan tagon per dikaj, maldelikataj lipoj. La rudŝaj sanmakuloj sur liaj vangoj ardas pro petolkuradžo. Jadus dronas en kontento, sentas sin hejme. En la vespero li surmetas gelbakoloran talaron kaj iras al la ekster-urba vilao. Kiam li renkontas non Edisa, ankoraw kreskas lia malavara komplezemo. Li montras sin ŝatinda, fratetse zorgema, kaj okulifas al ŝi. Je tŝiu ŝia parolo li trovas tŝarman karresvorton.

– “Vi estas la plej afabla filjinjo de tŝiuj rabenoj!”
flatas li.

– “Mensoganto!” meditas la knabino, kiam la unua agrabla impresio pro tiu flataĵo jam pasis. “Mensoganto! Mi ne estas afabla por li!”

Ŝi komunikas tion ankau al Filok. Ŝi ne stias kial. Por la skulptisto ŝi jes estas afabla, jen la vero. Kial, tion ŝi denove ne stias. Sed Filok neniam parolis kiel Judus. Kial ne? Ŝi tserne ne dirus: «mensoganto!».

Spite sian avanan rimorson kaj puŝate de ne kontraŭstar-eblo ina stivolemo, Edisa refoje riskas engliti la atelieron de la pagana artisto, por vidi kiel li praktikas sian metion. Rakontante ke Sarea babilatŝis tiajn apsurdajojn pri ŝi kaj pri tiu Judus, kaj plendante ke tiu 'rudŝharulo' agas tiel fikarese, ŝi vidas Filok rudŝidŝi kaj piedbati la grundon kaj ŝi awdas lin grintsigi la dentojn. “Malbenita Judismo! Malbenita Judismo!” Ŝi ek-tremas. Ŝi time rigardas tŝirkawed tŝu iu sub-awskultas. “Ne!” kapskuas ŝi. “Ne! tion vi ne rajtas diri! Benata de la Tŝionpova estu Israel!”

– “Malbenita dŝi estas!” ripetas li.

– “Ne vere!” ŝi ripostas. “Vidu, Jesuo, kiun vi nomizas Dio, estas ja Hebreo!”

– “Ne vere!” kapskuas li nun siavitse. “Ne Hebreo tŝar «Diulo» Li estas!”

Ŝi staras konsternite. Ekvidas enigmon. Se Li estas Dio, tiamdo tŝu Li ne povas esti Hebreo? Ni ja estas Lia propra gento! Dio! Tŝu Dio? Sed li ja estas homo! Edisa neniel komprenas. Kaj Filok asertas: «Li estas Diulo!» Tŝu ŝi protestu: “Filok, vi erarvagas”? Neniam! Kaj la patro tsertigas:

«Jesuo estas la Mesio.» Tŝu ŝi rajtas dubi pri la patraj paroloj? Neeble! Kredi ŝi ja kapablus, kĵaj non Filok kĵaj Patsjon. Sed kompreni ŝi ne povas.



Sarea kaj Jodus sidas hejme. Intime solaj. Mezombro ŝwebas en la malgranda tŝambro kiu servas samtempe kiel lodĵejo kaj tortŝofarejo. Jodus tŝeestis avan nelonge konversadon inter sia patro kaj sia mastro. Post komertofermo, li silente revenis hejmed kun la patro.

– “Patro, via agmaniero estas enigma al mi. Jam de longa tempo vi kampanjas kontraŭ la Nazaretanod, malamas lin tŝar li volas esti rigardata kiel Mesio. Kaj nun vi parolas kun Majstro Joram kfazaw ankaw vi kredus je tiu Galilujano.”

Sarea esplore rigardas sian filjon dum momento. Tiam pentridĵas ruza rideto tŝirkaw lia buŝo:

– “Jodus, mia knabo, tsi stias ke sole la malabundo de niaj rimedoj rifuzas al nia parentsaro la plej altan konsideron en Jeruzalemo. Ni devas, dĵevas, enkapigi al ni atingi grandan vivokomforton. Tsi estas kapabla supred levi nian tribon, alte supredigi. La ebleto kuŝas apud tsia mano. Tŝu tsi komprenas min? Pro tio ni devas akapari non Joram. Li donos sian filjinon – kaj kune kun ŝi la doton – tio estas tuta sia havaĵo al kiu ajn li deziros.

– “Sekfe vi nur ŝajnigas, Patro?”

– “Nomizu tion kiel tsi volas, filjo mia. Por kapti fiŝon, oni bezonas reton.”

Jodus enpensidĵas:

– “Mi ne volas fari opstaklon al via plano, patro,” li diras. “Mi volas igi la knabinon favora, por tiele gajni la patron. Sed preteksti ke mi kredas je tiu Galilujano, tion mi dżis nun ne kapablis; eťs ne provis. La tuta Alta Konsilio staras ja malamike kontraŭ tiud tšarpentistod. Kaj estos netsese konvinki ankaw la Konsilianojn por suktsesi en viaj planoj!”

– “Mi stias, Jodus. Sed mia pozitsio en la Konsilio estas pli firma ol tsi eble taksas. La tšefpastro pensas pli per mia ol per sia propra tserbo. Li neniam trovos min mallojala; por tio mi zorgos. Sed tsi devas kapabli pri silento. Plu ne, kiel tsi faris avane, kontraŭstari la opstinan pensmanieron de Joram. Prefere lasu tsin duone konvinki paŝon post paŝo. Iam, kun la edzineto sub tsia tegmento, Joram plu ne povos malutili al tsi. Jam lasu tion esti mia kontserno!

Ridetante Jodus karesas sian mentonon. La ritŝe plenigita bazaro de Joram lumas antaw lia mensa okulo. Tie estros li. Kaj Edisa lin servos.

Sarea ekbruligas tortŝon kaj prezentas al sia filjo skrib-rulaĝon.



Joram estas kontenta. Tŝu li ne estu kontenta? El Galilujo li venis kun siaj planoj, kaj vidu, la Tŝionpova sendas al li non Jodus, kiu en mallonga dawro pli ol duobligis la vendojn en la butikoj kaj metis en liajd manojd grandan parton de la tiutsele bezonata mono. Sperta komertsisto, tiu filjo de Sarea! Nu jes, la patro mem trovidžas dre

la stsenejo, sed lia idotso tamen estas diligenta kaj lerta. Kaj la honestetso mem.

Kaj tŝu Joram ankaw ne frotu al si la manojn pro reakiro de influo en la Alta Tribunalalo? Sarea plu ne atakas lin. Neniam kontraŭparolas. Ne nur la rabenoj Josef kaj Nikodem kuradziĝe kapskuas al li, sed ankaw aliaj egzegezistoj nun emas demeti tŝiun malamiketson rilate al lia persono aw konvinko. Ree, oni dirus, de-post kiam ili plu ne devas timi non Sarea. Kio do perswadis la avane tiel atsidan kontraŭulon? Joram ne stias, tŝu tio estas tributenda al li mem aw al la Mesio Jesuo. Sed ligi pli forte al si la favoraton de la tŝefpastro, donante non Edisa kiel edzinon al lia filjo – deziro de Sarea sendube – tio aperas al Joram ne malkonsiderinda.



Joram iris for al la Templo. En la laborejo de la Heleno silentidziŝis la frapado kaj tŝizado. Edisa enŝtelidziŝas. Tiu skulptado; ho! ŝi estas tielege interesita pri dži! “Kiamaniere vi suktsesas, Filok, finpretigi kapon tiel nete ke oni vere povas trovi en dži homajn trajtojn, homajn sentojn etŝ?”

Edisa supred levas aldorse starantan buston kaj turnas džian vizadzon al si. Subite ŝi ŝtonidziŝas; mirfrapite rigardegas jen la artiston, jen la bildon. Rapide kreskas ia konfuzo. Ŝi kredas apenaw kion ŝi vidas. Filok ridetas.

– “Kiu... kio...?” balbutas la junvirino. “Kio... kio... estas tio!”

– “Jes, kiu?” li demandas, ade ridetante.

- “Filok!” elkrias ŝi. “Tŝu tio... tŝu dži estas mi!?”
- “Kion vi do pensas?” dĵoje mienegas li.
- “Filok, kiel vi povis!” fuŝparolas la knabino, dum rudĵo farbizas ŝiajn vangojn.
- “Kiel mi povis, Edisa? Per miaj tŝiziloj, per miaj marteloj. Tŝiu trajto de via vizadŝo sidas en mi tiel solide kaj profunde, ke prosperis al mi sen via tŝeesto.”

Edisa staras perpleksa. Sed subite venas io en ŝiad memorod:

- “Filok, Filok!” ŝi murmuretas. “Tio... tio estas mal-permesita! Jehovo diras: «Vi ne faru al vi tŝizitan bildon» kaj vi...”
- “Edisa, mi ne estas Hebreo!”

Timo superfluas non Edisa. Ŝi dreenuidĵas kfazaw pro io nepura, malfermas la pardonon, kaj rapidegas ekstered.

Per ŝantselaj paŝoj kaj kun klinita kapo ŝi surtretas la dĵardenon de la patro. Neatendite ŝi staras antaw viro: Jadus. Kfazaw pro fantom-aperaĵo, ŝi eligas krion. La junulo strabas al ŝi, malbonawgure, jen grimatse, jen fiafable. Fakte perfidas lia mieno tion kio movidĵas en la koro de Jadus. Li stias ke la moroj malpermesas al Hebreo, etŝ pli al Hebreino, transiri la sojlon de pagandomo; tial lia malbona humoro. Li stias ankaw ke Joram, ŝia patro, severe aplikadas la Ledĵon. Sed Jadus pertseptas ion kroman: la ritŝa filjino de lia mastro iom maltro okupas sin pri li, law lia gusto. Kaj tiam-tŝi sin prezentas okazo por gajni influon je ŝi, por ŝuldigi ŝin al li!

- “Kion diros la patro?” demandas li kun malfatsile kaŝebla grimatso de ruzo kaj tamen kun ri-

markinda indulgemo. «La patro?» Edisa stias kiel amare Patsjo riprotŝus, se li ekstius pri ŝiaj ledzorompoj.

– “La patro?” ŝi ripetas. “Sed mia patro ja ne stias! Mi nur rigardis tra la porda fendo, por vidi kiel oni praktikas la ornaman skulptadon. Tŝu estas tiel peke?”

– “Tiu porda fendo ege etendidĝis dĝis la interno!” sarkasmas Jadus. “Mi vidis tsin malfermi la pordon kaj forlasi la laborejon.”

Edisa eniras la vilaon. La subita renkonto tute forpelis la sentojn, estidĝintajn tŝe Filok, kaj akriĝas ŝian intelekton. Neinvitite la junviro sekfas ŝin kaj premfermas la pordon.

– “La patro ne stias ke mi estis tie,” diras la knabino, “kaj vi, Jadus, ne rakontos al li, tŝu vere?” aldonas ŝi kun kalkulema virina rideto.

Jadus rimarkas subite kiom rava kaj allura ŝi estas kun tiu rideto, kaj unuafoje li eksentas ŝian estaĝon influi je lia koro. Lia vizadĝo prenas esprimon de enamidĝinto.

– “Edisa,” li diras, prenante ŝian manon, “tŝu tsi konjektas kiel forte mi inklinas al tsi? Pro tio mi promesas, ke mi restos absolute muta... je unu konditŝo: ke tsi nun donu al mi kison rekompentse.”

Edisa deŝiras sian manon. Per grandaj okuloj ŝi rigardas lin. Antaw ŝia spirito aperas la patro kaj Filok, kaj trudeg-idĝas demando al ŝiaj lipoj, simila al tiu kiun ĝus faris Jadus: “Kion dirus mia patro kaj... Filok!” Sed ŝi ne pronontsas dĝin.

– “Neniam mi kisis junulon,” ŝi respondas. “Tion mi ne kapablas. Tion mi ne faros!”

La alia malvarme ridetas:

– “Tiamdo mi informos non *Rabi Joram!*” li minatsas.

Ŝi eksentas froston. Sed ankaw atakas ŝin abomeno tuŝi tiun pintan, malŝatindan mienatŝon per signo de amo. Ŝi klinas la kapon.

– “Nu?” Jodus proksimigas sin kaj metas manon sur ŝiad ŝultrod. Senzorge li dawrigas: “Nu, iam devos esti la unua fojo, kaj mi tre dĵojas ke tiu unua estos por mi. Venu!”

Li antawenigas la buŝon kaj altiras la knabinon. Sub impeto de la timo ŝi ekagas. Tuj ŝi dreenigas sin tŝar la tentanto, pelata de pasio, nun metas ankaw la alian manon sur ŝiad korpod, ŝin premas al si kaj kisas. Kolere ŝi vangofrapas lin kaj klopodas ekkuri for. Sed li baras la vojon al la pordo.

Unu momenton ancoraw flagras liaj okuloj, sed li bremsas sin, ekridetas kaj gestas kfazaw li volus denove tŝirkawpreni ŝin.

– “Ax, tŝarma gazelino,” ridetas li artifike, “jam ne koleru pro tia malgravaĵo! Tŝu do ne estis agrable, tŝu ne estis plezure?”

– “Iru for!” ŝi ordonas. “Iru for, aw mi alvokos la servistinojn!”

– “Ne netsesas minatsoj, karulino” rezignas li. “Vidu, mi iras jam. Ne forgesu silenti, tamen! Tiamdo ankaw mi silentos. Kaj tsetere, pripensu ke la patro eble iam donos tsin al mi kiel fiantŝinon. Tagon, mia turtinjo!” Je tio li malaperas.

Ŝi glitfalas sur benkod kaj amare ekploras.

Abomeno levidžas en ŝia koro por la filjo de

Sarea. Neniaĉo plu ŝi fidis lin. Ŝi evitis lin kaj
jam ne lasos okazon por malnoblaĵoj
impertinentaĵoj!

Enigma Redĵokandidato

Sian zonon plenprovizita per mono, sian grizan mantelon tŝirkaw la ŝultroj, sian bastonegon en la mano kaj dike plandumizitajn sandalojn sub la piedoj, tiele Joram denove ekvojadĝis al Galilujo. La nova negotsoprizorgisto ritsevis la taskon detaleme kontifadi kaj tŝiun vesperon prezenti raporton al Edisa.

Jadus aktseptis kun entuziasmo kaj nun paŝadas tŝiutage al la vilao. La tie estranta knabino iam idĝos lia edzino, tio estas lia konvinko, kaj la altaj profitoj refluos en liajd manojd. Li avide atendeĝas la tagon en kiu li sendos fid-indan amikon al Joram kun edzidĝopropono. Estas ancoraw tro frue, asertas lia patro. Tŝi-tiu afero estas ancoraw ne sufitŝe preparita tŝe Joram, kiu nun domadĝe estas for. Sed milda humoro de la knabino mem, etŝ se ne nepre netsesa, tamen povus kunutili al favora detsido. Estu do kontsientsa, mia bubo, kaj ne malatentu non Edisa.”

Jadus jam stias kion fari. Tŝu li tsetere ne sentas sin lurata de la tŝarma figuro de tiu virino? Kaj tŝu lia menso ne ade projektas manierojn por familiaridĝi kaj por ŝin korligi? Kontakto kun ŝi, pli intima interrilato, jen lia plej arda deziro. Sed li ne havas multe da bonŝantso. Etŝ ne unu solan fojon li trovas ŝin sola, kiam ŝi aktseptas lin en la vespero. Tŝiam apudsidas du servistinoj,

fingr-umante super tekslaboraĵoj, kiuj law ŝajno urdže netsesigas konsilojn. Al la knabino ne venas en la pensod ilin forkomandi. Kial bezonas tiuj do ŝovi siajn stivolajn nazojn en la elkalkuloj?

Jadus jam provis surprizi non Edisa dumvoje al la Templo, sed tŝiufoje li renkontis nur tiun perfidan Eglu, la pli junan el la domaninoj. Li klopodis konsentigi la knabinon veni dumtage al la bazono, por paroli persone kun iuj alt-ofitsistaj klientoj kaj kontrol-opservi la vendojn. Sed Edisa pretendas posedi neniom da komertsista talento kaj ne montras sin.

Fine li ekkuradĝis interdume kuri al la vilao kun iu preteksto. Sed je tŝiu provo tiu fiservistine insidema Misax stiigis al li ke ŝia mastrino ne estas. Kie do trovidĝas Edisa? Tŝu ŝi vagas en la tŝirkawaĝo? Tŝu ŝi elprofitas la patran foreston? Aw... tŝu ŝi provus lerni skulptadon? Jadus ne kapablas forigi sin de la vilao. Li trene promenas en la dĝardeno kaj sin kaŝas por spioni al la laborejo apude. Je tio li ja ne divenas ke du paroj da virin-okuloj sekrete opservas lin el la domo.

– “Jen, li ensaltas en la arbetoĝod!” ridas Misax, la konfidentsulino de Edisa.

– “Neniu povus malkovri lin malantaw tiu tsedro, ek-de la laborejo, sed ni bonege vidas lin,” gajas la knabino.

– “Li pufigas al si la okulojn.”

– “Jes, ili tuj elfalos!”

– “Tŝu lin ne atakus spasmoj pro tia stretŝado?”

– “Kompatindulo, kiel senmove kaj rigide li devas teni siajn longatŝulajn brakojn!” subridas Edisa.

– “Returned iru al tsia butiko, kupruma vulpo!” ŝi mokus, “Edisa ne estas tie-tŝi. Kaj ankaw ne tie. Ne plu Edisa iras al la ateliero! Filok ja venos mem... kiam tsi tion ne vidos!”

Estas vero, tiel bone la najbaro jam komprenas ŝin, ke li neniam proksimigas sin al la vilao, se tie ne staras «sen dandžero» sur la teraso.

Sed kiam Misax tie postrestigas balailon, tiam li jes kuradžas vizite enveni por eksponi antaw la admirantaj okuloj de la virinoj, sian skulptolaboradon, siajn modlurojn por juveluoj, kestetoj, kaj armoj. Tiam Misax kaj Eglā – nejudaj sklavinaj – baldaw aprobe kapsignas kaj eklaboras aliloke. Nun la du junaj homoj sendžene konversas pri multaj uloj kaj umoj kaj tserte ankaw pri la lastaj novaĵoj kaj rakontoj rilate la miraklulon el Galilujo. Por Filok tiu subjekto estas neniam el-tŝerpita.

– “En mia spirito mi portas Lian bildon, Edisa. Ne: Lia bildo portas mian spiriton. Dži posedas min tute... Ax, mi deliras... Tiu bildo kreskadus en mi. Rave belaj estas Liaj vizadĵotrajtoj; tŝio, kio estas bona kaj nobla el dži radias. En dži kuŝas plej alta majestetso. Dži ancoraw ne estas plene kreskinta, kaj jam staras kompleta antaw miaj mensaj okuloj, tio kion mi deziras vidi...”

– “La Nazaretano, la viro kiun vi nomizas dio, tŝu ne?”

– “Vi eldiris džin, Edisa, dio. Ax ve, kia mi devas Lin modli? Kia mi devas Lin tŝizi? Helpu min, Edisa, kaj diru al mi kia vi vidas tiun Homon, tiun dion, tŝar ankaw vi kredas je Lia dietso, tŝu ne?”

– “Tŝu mi, Filok? Mi?”

– “Jes, ankaw vi! Ankaw vi kredas je Lia superhometso. Mi vidas tion en viaj okuloj, mi awdas tion en via votŝo! Nu, jam diru al mi ke ankaw vi kredas, Edisa!”

– “Pri tio kion kredas vi, Filok, kion kredas vi... tŝu mi povas dubi? Sed Filok, ne diru tion al mia patro, neniam tion diru! Mi timas ke li malbenos min kiel paganinon, kaj sendos min for kiel malfidelan al la Ledžo. La patro ne kredas, Filok!”

– “Mi stias, Edisa, via patro estas vidante blinda, ve! Fiks-ideoj detenas lin. Kaj tamen estis liaj propraj paroloj pri spirita revividžo, kiuj gvidis min al ekvido de la interna beletso de tiu Homo kaj al avansento pri tio kio Li estas... Sed mi ne volas disigi vin de via bona patro; mi ne volas ke li malbenu vin. Mi silentos. Mi stias ke mi intsitegas la rabenon per mia bildoskulptado. Sed tŝu mi kapablas lasi tion kion mia tuta naturo postulas de mi? Rigardu, vi prave parolis; novan bildon de la Viro, kiu estas dio, mi volas krei. Sed mi ancoraw ne kapablas. Pro tio mi iros for. Trovi la Nazaretanon. Kontempli Lin dum Liaj miraklofaroj kaj tiam bildigi el ŝtono tia kia Li estas. Ho, se mia verkažo povus suktsesi, Edisa! Kiel volonte mi montrus džin al vi!”

Jam en la posta tago Filok plenumis sian intentson. De-sur la teraso lin postrigardis Edisa. Li ekiris survoje al Jerixo kaj li portis sian purpure brunan mantelon.



En Galilujo Joram alvenas je maloportuna momento: Izboret ne vidatis de avan pluraj tagoj, diras la najbaroj. Li ja havas tiom da farendaĵoj. Neniu stias kied li direktis sian trot-beston. Joram lodžas en gastejo. Multon li awdas pri la Viro el Nazaret, sed en kiu loko Tiu nun estas vaganta, neniu kapablas diri. En Galilujo Li tserte ne trovidžas.

Preterpasanta vojadžanto awdis vigle paroli pri Li en Pereujo. Tio estis jam avan kelkaj tagoj.

– “Kaj kiel sin tenas la homoj tie, rilate al Li?”

– “Ili kredas Lin la verega Mesio. Multaj diras ke tempo venis por fondi la Regnon. Li ankaw mem ofte parolas pri tio. Sed en stranga maniero, tiel ke la awskultantoj ne stias kion fari.”

– “Tŝu ili volus havi Lin kiel redžon?”

– “Unu parolo, Rabi, unu parolo de Li, kaj oni portos Lin sur siaj ŝultroj al Sion!”

Joram ridetas. Iam baldaw ja la Nazaretano pronontsos tiun parolon, pensas li. Sed Jesuo ne povas preterlasi la oportunan okazon. Ne lasi la fervoregon malviglidži. Kion Li do atendas? Tŝu finantsan apogon? Tŝu subtenon fare de tŝefuloj?”

En sia zonrimeno Joram palpas la monon kaj li ridetas denove. Izboret mem jam ekaperu. Ties konsilon kaj stion kontserne la situaSion, ties helpo li bezonos por riski novan provon.

Dum kelke da tagoj Joram devas plu eksertisian patsientson; tiam aperas la negotsisto.

– “Iris al Jeruzalemo, *Rabi*, al la Templo Inawgur-festo. La Nazaretano estis tie. Li bele paroladis.

Diskutis kun la kleruloj. Jen tŝio. Li ne agis. Male. Li reforlasis la tŝefurbon kaj aktuale vagadas en Pereujo.”

– “T u mi ne provu fari novan elpaŝon, Izboret? Mi havas monon. La popolo flankas Lin.”

– “Kaj la superuloj kontrawas Lin, *Rabi*. Sed nu, la afero realidžu iel ajn, sen aw kun la Adžuloj, kiuj volas elmeti etŝ ne unu fingron por konkeri la liberetson!”

Izboret jam baldaw varbis kelke da kunuloj, volontaj pro mono sertŝi aventurojn en Pereujo. Survoje alidžos novaj kamaradoj, batalpretaj, tion garantias Izboret. En Pella kreskas ilia nombro džis dek-kfin, kun Mathan kiel tŝefo. Tŝiuj estas armizitaj, estsepte de Joram. Por batalo li ne tawgas, deklaras li, sed monon donatsi li tserte povas kaj volas. Neniu tamen, krom Izboret kaj Mathan, bezonas tion stii. Ankaw Mathan pretendas posedi kapitalon. “La via probable estus pli sekura tŝe mi, *Rabi*. Mi havas kelkajn fidelulojn, kiuj se netsese defendos min džisekstreme, kiam aperus dandžer-minatso. Kaj plie, *Rabi*, unu viro inter ni ja devos kapabli esti redže mal-avara en la oportuna momento. Tio provizas emon kaj devigon. Vi ja bone stias, ke dži ne estas tiel fatsilete rikoltebla kiel de-sur arbedo!”

Joram konsentas tsedi parton el sia havažo. – “Jen, tiu Jesuo mem, kara Rabeno,” rediras Mathan, “estas la plej malfatsila problemo. Li opstine sin tenas je la propra plano. Kiun planon, mi ne džuste stias. Ni jam plurfoje klopodis Lin proklami kiel Redžon de Israel, sed tŝiufoje Li

forglitas kaj malebligas la aferon. Tie trovidžas la kawzo ke ni ne suktesas kolekti pli da batalontoj. Niaj viroj deziras ke Li efektivigu la natsian liberigon. Nur Li, kiu tion kapablus, povus esti la de Jehovo elektita Mesio. Sed nun tiu Jesuo ŝajnas malmulte pensi pri tio.”

– “Eble Li opinias, ke estas ancoraw tro frue, Mathan.”

– “Kiam tiu tempo do jes venos?”

Ankaw Joram ne stias.

Kuras famo ke la Nazaretano vojas al najbara viladžo. La grupeto sin direktas tied kaj efektive trafas Lin en la synagogo.

Nek Joram nek Mathan nek Izboret intentsas pridemandi Lin. La Profeto aspektas tiel impona ke ili ne kuradžas. Mathan tamen akre opservas Liajn gestojn kaj sin demandas kion Li volas. Izboret atente awskultas Liajn parolojn, kiuj aperas al li tiel ne kompreneblaj. Dume, Joram komparas la antawmetatan doktrinon kun siaj propraj dogmoj.

Awskultu: “La Regno de Dio venos ne tiamaniere ke oni džen rimarkos. Oni ne diros: «Dži estas tie, dži estas tie-tși.» Tšar vidu, la Regno de Dio estas en vi mem.”

Joram jubilas pro la awditažo. Li do idžas nepre prava: Tiu-tși, la Mesio, venas fondi regnon de religia idealo. Pli firme ol iam avane, Joram estas konvinkita, ke tiu-tși Profeto estas la Aspirata. Kiele Li fondos Sian regnon? Tšu Li per helpo de armeo da subuloj liberigos Sian popolon, kiel Abraham liberigis non Lot? Aw tšu Li, kiel Gideon, utiligos nur kelke da bravuloj; aw ancoraw

kiel David tute sola grunded faligos non Goljat kaj post tio Sian regadon establos en patso? Aw tŝu Li nur levos la manojn dum la batalego, kiel faris Moseo? Mistero! Mistero!

Post Sia parolado, la Nazaretano tuj ekpaŝas al nova viladĝeto. Granda estas la miro de Joram, kiam li vidas proksimigi sin Filok el-inter la forkubutifanta amaso.

– “Mi sekfadas Lin kied ajn Li iras!” asertas la Heleno, montrante al la Profeto. “Neniam instruanto parolis profetajn vortojn de vero, kiel Tiu-tŝi. Li estas la Vero mem.”

– “Tsi vidas la Mesion alimaniere ol niaj homoj, Filok,” rimarkas Joram. Ili sertŝas en Li predikanton de liberetso kaj kaptonton de mondregado. Tsi, tsi sertŝas profeton, lerniganton, veronproklamanton. Mi lawdas tsin pro tio, kara Filok, kfankam tsi estas pagano.”

Apenaw la sadĝulo ritsevas tempon por demandi novaĵojn pri Edisa kaj Jeruzalemo. La entuziasma junulo delasas ne unu sian okulon de la foridĝanta Viro, Kiu lin tute okupegas. “Ankaw Sarea tŝeestas,” aldonas li kaj tiam kuras for.

Ezekia, la loka synagoga superulo, kunluras non Joram al sia hejmo. Survoje ili renkontas la batalemulojn, far-de Izboret dungitajn. La vizadĝoj perfidas malbonhumoron. En la domo Joram trafas nojn Izboret kaj Mathan, krom Jakobus kaj Simon, ditŝiplojn de la Nazaretano. Tiuj-tŝi tamen aspektas hastaj, kio instigas non Joram ilin alparoli senprokraste:

– “Kiel longe via Majstro ancoraw lasos nin en

konfuzo?” li demandas. “Kiam Li permesos ke oni kronizu Lin redžo? Rigardu, armizitaj batalontoj staras pretaj kaj vi estas kun multe da fideluloj en Lia sekvantaro. Iru kaj diru: «Vidu, grandaj monsumoj estas je Via dispono. Kiam fine la momento estidžos?»”

La du ditŝiploj skuas la kapojn.

– “Vi ne konas nian Majstron,” respondas Jakobus. “Auskultu Lian tsertigon: «Envere, Mi diras al vi, ke ritŝulo malfatsile eniros la Regnod de la Tŝieloj.» Tiele, stiu do ke nia Majstro, Li Kiu parolas vortojn de eterna vivo, mem posedas ne unu Draxmon, ne fidas je ritŝažoj kaj kondamnas la emon al materiaj trezoroj.”

– “Kiumaniere Li volas tiamdo venki la Romenojn? Kaj kiumaniere establi Sian regnon?” mokas Mathan. La helpon de niaj manoj Li ignoras. Niajn monrimedojn Li ne deziras. Tŝu tiamdo ni devos agi sen Li? Tŝu Li eble intentsas poste pluki la fruktojn de nia lukto? Lia potentso estas granda: ni vidis Lian panmiraklon; Li devegas helpi al ni, nin gvidi en nia liberiga milito!”

– “La Promesito povas tŝion kion Li deziras!” tsertigas Simon. Redžo Li idžos. Por kiam Li planifas tion, neniu stias.”

– “Almenaw iru kaj diru al Li: «Vidu, tŝio estas preta, bonvolu ekagi»,” petegas Joram.

– “Li ja stias kio estas preta; nur ni ne stias,” denove konfirmas Simon.

– “Kion do fari?” elspiras Izboret.

– “Ni ne stias!”

Je tio la ditŝiploj elpaŝas revoje al sia Majstro. Mathan staras tute konfuzita.

– “Pigruloj! Revantoj! Idiotoj! Jen viaj aliantsanoj en tiu medio!” li ekfulmas kontraŭ nod Izboret. “Pli fortajn virojn ni devas sendi, virojn kiuj kurdaĵas interveni kaj Lin vipo al ekago. Tiuj-tŝi nur kuradas malantaŭ Li kfaraw infanoj, aŭskultante kaj silentante. Rigardu, tie pasas Sarea, la Altkonsiliano, en sia blanka vojadĵorobo. Se ni povus tiun varbi!”

– “Lasu tiun!” konsilas Superulo Ezekia. “Li estas spiono. Nenio pli. Kaj li agitas kontraŭ la Profetod. Etŝ hodiaŭ li tion faris, jen en tiu-tŝi domo.”

Spiono? La vorto frapis non Joram. Duan fojon li trovas non Sarea sur la spuro de la Nazaretano. Tŝu li efektive estus elsendita de la grandpastro por kontroladi la profeton?

Joram forigas sin de la grupo por aliri la synhedran membron.

– “Tŝu vi renaskidŝis ditsiplo kaj piede sekfas jenan profeton?” Sarea tuj demandas, duonŝertse, duonserioze, post la salutoj.

– “Mi volas ekkoni Lin pli intime,” Joram konfesas. “Vi stias, ke mi admiras Lin kaj multon de Li espektas.”

– “Tiel ankaw mi nun tenas min rilate Lin,” Sarea papagas. “Pli kaj pli mi vidas en Li la Atendatan, la Liberigonton: Liaj mirfaroj estas grandaj! Mi vidis vin eniri tŝe Ezekia, kun Izboret kaj Mathan el Pella. Trovidŝis tie ankaw du sekfantoj el la sotsieto de la Profeto. Tŝu ili tŝiuj estas membroj de la Liberetsopartio? La Nazaretano vivas kun ili en firma akordo. Aw tŝu mi eraras? Tŝu vi stias ilian intentson?”

– “Mi ne apartenas al la Zelotoj,” kontraŭdiras Joram prudente, tŝar la stivolo de la pridemandanto vekas lian malfidon.

– “Ankaw min ekkaptas inklinon por anigi min al ili,” pluprovas Sarea. “Sed por mi estas malfatsile malfermi iliajn orelojn, tial ke ili konas mian pasinteton. Tŝu vi ne bonvolus ilin perswadi, *Rabi*?”

– “Mi ne kuradŝus aserti ke via opinio rilate al tiuj viroj estas dŝusta,” ripostas Joram. “Sed se ili efektive apartenas al tiu ribelema partio, tiamdo mia parolo sendube estus vana.”

Joram kurtigas la konversadon kaj adiaŭdiras. Forte impresis lin la awditaŝoj. Sarea spiono? Tŝu tio rilatas al la Profeto sola? «Li suspektas min esti membro de la Liber-iga Partio. Volas intrudi sin en tiud rondod. Sen konvinko. Tie li agitas kontraŭ la Nazaretanod; tie-tŝi li pretendas admiri Lin! Eble li volas elsertŝi tŝu la Profeto prenas apogon sur tiu partio por konstrui Sian regnon? Sarea ludas ruzan ludon! Tŝu tiel ankaw ne status tŝe Izboret kaj Mathan? Kaj la Nazaretano, kion Li gardus kaŝita? Li, 'La Vero' law Filok? Sinjoro de la Sinjoroj, en kia labirinto perdidŝas mi! Kiom da sekremaj manoj mi ekvidas tŝirkawel?»

Tremetado de soletsulo, kiu sentas sin kfazaw staranta antaw dandŝero kies veran formon nek forton nek adekfatan defendilon li distingas, vibras tra Joram. Senprokraste li detsidas elŝiri sin el tiu tawzo kaj returne vojadŝi al Jeruzalemo. Li bezonas pripensadi en trankfilo.

La vintra monato Ŝebat estas jam finidŝonta; la

migdalarboj montras ŝvelintajn burdžonojn.
Joram remigas sin trans la Jordan-riverod,
oktsidented, kie kuŝas Sion.



Malkovro

Jadus estas elrevidzinta. Lia espero swati non Edisa aw almenaw interesigi ŝin, montris sin vana. Dum tiu bela longa tempo ke ŝia patro forestadis, li nenion atingis, nenion! Etŝ malpli: ŝi lin evitegas; plu neniŭ dubo – *raka!* Ne gravas ŝia fipersono! Kiom ŝi ja valoras? Sed la komertsejo de Joram, vidu, ke dži povus gliti el liaj manoj, tio jam estus la plej katastrofa sufero, kiun la Tŝielo povus transsendi al li, kaj kiu tŝagrenus profunde ankaw lian patron.

Nun Jadus vokatis de la mastro por kontroli la kontojn de lia administrado dum la lastaj semajnoj. Jen almenaw brilas esperiga sunradio sur lia vojo. La juna viro tsertas ke ne unu Draxmo estas diskutebla. Tiu fakto povus influi la monavidan komertsiston sufitŝagrade por riski fari edzidž-proponon en unu el la sekfontaj tagoj.

Sufitŝe malvarme Jadus aktseptatas de la mastro. La fajrero de malfido kontraŭ la patro dintsitis Joram ankaw rilate la filjon. Sed ju pli oprogresas la detal-analizo de la transagoj, des pli afable Joram ridetas al sia komizo. Mankas etŝ ne la valoro de kupruma monereto je la fin-kalkulo. Joram estas kontentega.

– “Jadus, vi meritas plej grandan lawdon!” li gaje krias al la junulo. “Propra filjo ne povus administri miajn aferojn kun pli da diligento kaj honesto! Je la Templaj Trezoroj, oni ne diros ke Joram lasas sen rekompentso bonan servon al li

faritan!”

Jadus kune sidas tŝe la festen-tablo, per kiu oni festas la sankorpan revenon de la domestro. Li kune trinkas de la bonaroma vino el Damasko, servigata de la gastiganto, kaj li kune iras al la teras-tegmento, por tie fini la tagon per intima konversado en festa etoso.

Edisa restas nur mallongan momenton en la vira sotsieto. La geservistojn, pretendas ŝi, oni ne povas lasi senkontrolaj. Supred aw malsupred irante law la eksterdoma ŝtuparo, ŝiaj rigardoj tŝiufoje vagas al la najbara laborejo, spite la stion ke tie nun trantŝadas kaj tŝizadas neniun art-iston. Kie nun troviĝas Filok? Tŝu ankaw li eventale estintus rajtigita kunsidi tŝe la festena tavolo?

Ankaw Joram kaj Jadus foje direktas siajn okulojn al la forlasita laborloko. Tiam la pensoj de la rabeno returnas al Pereujo, al la Profeto, kaj al la sertŝanta Heleno. Jadus ne lasas tempon al li por multe revadi kaj babilas sentŝese. Tamen ankaw lin la memoro pri tiu Heleno ne lasas trankvila. La afero pri Edisa, ŝia vizito al la laborejo tie kaj la sekfintaĵoj; tŝio-tŝi kirlidĝas en lia kapo. Ne volonte li rakontus kiel tiu okazintaĵo intsitegis lin dum tagoj kaj noktoj. En la komentso li ne kuradĝus supozi ke Edisa servis al li mensogeton. Sed tiu penso ree kaj ree supred-idĝas en li kun tŝiufoje plia trudo. Fine li tŝedis al tiu ebleto. Sed tiukaze... kial ŝi mensogis?

Nun, kun la okuloj sur tiu laborejo, fibrava pro la lawdo de lia mastro kaj sub narkotiga efiko de tiu purpura likfaĵo, nun ekopsedas lin eksplikoj, ki-

un li neniam kuradzintus envortigi. Tiu-tŝi ekspliko tsetere klarigas la malbonvolon de Edisa kontraŭ li. Se li foje konigus tion? Tŝu en tio ne kuŝas rimedo por forigi la opstaklojn? Tŝu ne vojo al flatkapto de la jam sufitŝe favorinklina patro?

Unue Jodus disdonas kelke da laŭdvortoj pri la verkado de la artisto.

– “Domadže! Domadže ke li lodžas dĝuste tie-tŝi,” ellasas li tiam.

Kun mir-okuloj Joram atendas la sekon. “Tŝu domadže?” li demandas fine. “Male, estas tre fatsilige por nia komertsa intertraktado.”

– “Jesja, Mastro! Sed li estas pagano!”

– “Jes, pagano li estas.”

– “Paganoj ne konas niajn skrupulojn, Mastro!”

– “Etŝ ne ombron, Jodus.”

– “Ankaw ne rigarde al virinoj.”

– “Prave tsi diris.”

– “Et ne rigarde al judaj virinoj.”

– “Ne... sed kion tsi tselas?”

– “Etŝ ne al judaj najbarinoj.”

– “Parolu malkaŝe, Jodus! Neniam mi rimarkis ion suspektindan en Filok.”

– “Filok estas pagano. Edisa estas judino.”

– “Jodus, kiel samrasano tsi estas devigita ekspliki al mi kio metas tiajn aludojn en tsiad buŝod!”

Joram duone levis sin kaj kun senkaŝa maltrankfilo li fiksrigardas al la junviro.

– “Vi pravas, Mastro, mi devas paroli. Jen do: mi kredas fakto, ke la Heleno deluras vian filjinon. Sendube li invitas ŝin por admiri liajn paganajn

statuojn. Ja unu fojon mi rimarkis non Edisa forlasanta lian laborejon.”

Jadus kaŝopservas sian mastron, mirigite ke tiu instruisto de Israel restas tiel senmove sidanta je la novaĝo. Joram ne saltlevas sin pro kolero. Joram ne blasfemas per emotsiaj paroloj kontraŭ nod Filok. Ne kriatiĝas ke Edisa devas aperi antaŭ lin kaj preni sian respondeton. Tŝu li eble jam ekstiis pri tiu-tŝi afero? Aw tŝu li taksus la *goj* pli alta ol la Ledĝaro de Moseo?

Joram silentas plu, sed li spertas profundan skuidĝon. Post kelke da momentoj ankaw li demandas sin, de kie venas tiu ekstera trankfilo en li. Esploru li rigardas al Jadus. Ne, oni ne rajtas dubi pri ties paroloj. Sed: estas la filjo de Sarea! Kial li memoras tion-tŝi? Ie li spertas vundidĝon. Lia filjino, super tŝiuj homoj kara al li... kaj Filok, la ununura pagano, ne, verŝajne la ununura persono kiun, estsepte de Edisa, li amas sintsere... tiuj du, en kiuj li investis totalan fidon... tŝu ili staradas tiel malproksimaj de li, ke ili povus piki alenon en liad korod? «Tŝu Edisa igus sin kulpa pri abomeninda ledĝ-ofendo, kaj Filok pri mal-delikata misuzo de fidemo? Jadus ne mensogas. Tserte ne. Kaj tamen, mia spirito estas nur modere agitita; ne pugnidžas mia mano...!»

Al la komizo Joram impresas kiel kolerigita aristokrato, kapabla regi sin en nekutima grado, kapabla obeigi etŝ plej fortan emoŝion al sia ratsio. Lia mastro tie subite elkreskas dĝis giganto de mensaj povoj. Mirigite Jadus demandas sin mem, kiel povis veni al li en la ideoj dari ludeton

kun tiu eminenta viro, ludeto kiun junatŝa komizo kia li kredis gajnipovi. Denove li sentas sin mal-granda knabo, vermo kiu rajtas rampadi, sed ne kompari proprajn fortojn kun tiuj de arbego kia jena rabeno.

Dawre mutas Joram. Plituŝe, plipreme Jadus sinkas en la kusenoj.

– “Bone agis tsi per tiu informo, Jadus. Mi dankas tsin,” komentas Joram finfine.

Ili ancoraw babiletas iom per kurtaj, formalaj paroloj pri aliaj temoj, sed reala konversado plu ne disvolvidžas.

Jadus estas kontenta kiam li povas iri for. Joram restas sur la teraso. Longatempe li sidadas, la okulojn najlizitaj sur la domo de Filok. Maldžojo kaj kolero alternas en liaj vizadžotrajtoj. Kelkafoje li skuas nee la kapon. Aliam li ŝajnas konfirmi iun opinion. Li ekstaras, faras kelke da paŝoj kaj residigas sin. Liaj manoj foje premegas apogilojn sed refalas malfortidžinte. Tŝu li atendas ion? Tŝu li sentas emon ekagi?

Kiam la kapo de lia filjino aperas super la planko, li dawrigas fiksrigardi. Sed kiam la knabino estas sin retironta, li alvokas ŝin. Tŝu estas vero, kion rakontis Jadus?

Edisa ekspiregas. Honte ŝi mallevas la kapon.

– “Jes, Patsjo...” ŝi ploras.

Joram bremsas la kormolidžon vekitan en li de tiuj larmoj. Severe li admonas la knabinon, montrante al la Ledžo kaj la sekfoj de ŝia malobeo.

Edisa singultas kaj silentas. Kelkafoje tamen ekflamas flagreto en ŝiaj okuloj, flagreto kiu ne

eskapas la atenton de Joram. Li atributas tion al naskidzanta kolero en ŝia koro. Pro kio tiu kolero? Tŝu dži rilatas la patron, juste montrantan al ia kulpo? Tŝu non Filok, kiu insidas ŝin? Tŝu non Jodus, tiu perfidanto? Joram divenas ke ŝi tenas ion kaŝita. Tŝu ŝi vere ne kuradzus paroli?

– “Edisa, tŝu tsi havas neniun defendon?”

– “Ne, Patsjo.”

Tamen, jen ŝi levas la kapon.

– “Patsjo,” detsidas ŝi, “se li parolis, kial mi ne rajtus fari same?”

– “Li?? Kiun tsi tselas, mia filjino?”

– “Non Jodus! Ni promesis prisilenti, unu al la alia. Tŝu mi nun ancoraw devas fari tion?”

– “Pri kio tsi parolas, Edisa? Diru jam!”

La knabino rakontas tŝion. Emfaze ŝi insistas ke Filok ne luris ŝin en siad laborejod. La maldignan konduton de la filjo de Sarea, post kiam tiu surprizis ŝin, ŝi substrekas per tiom da sintsero kiom da abomeno.

Denove Joram rigididžas kaj silentidžas. Evidente la sinrego nun prosperas al li malpli fatsile ol avane. Li petas la filjinon lasi lin sola.

Trankfile kaj senpartie li deziras pesadi la okazintaĵon. Demandoj levidžas en lia menso. Pro kio parolis Jodus, spite sian promeson? Pro kiu motivo Edisa tiel arde kulpigas la komizon kaj same arde defendas la skulptiston? Kiu kulpas, kaj kiu plej multe inter la tri? Tŝu ŝi, kiu pekis kontraŭ la Ledžod de Israel; li, kiu pekis kontraŭ la ledžod de detskonduto; aw li, kiu pekis kontraŭ la ledžod de bona najbaretso? Kiuj

motivoj kaŝas sin malantaw tŝio-tŝi? Aw tŝu temas pri la tŝiama virino, la virino kaj ŝiaj swatantoj? Pretsipe la lasta problemo premas non Joram. Longe li fiksrigardas antaw sid. «Jadus, tsi estas mem kulpa pri tio, kion tsi kaŝe ŝmiras sur nod Filok,» li findetsidas. – «Edisa, tsi ne timas malopservi la Ledžon, malpurigi tsin pro Filok. Kaj tsi, Filok, tsi... pri kio mi kulpigu tsin? Tŝu tsi plezurigas tsiajn okulojn, direktante ilin al tŝarma Judino, tsi pagano? Vana provo, viro! Tion tsi ja devus stii! Aw... tŝu eble džuste tial tsi iris for? Por indulgi ŝiajn sentojn, ne intsiti ilin plie?... Bele far-ite, Filok! Sadže. Noble. Tsi estas pagano nur je duono. Pli tawga ol multaj plenjudoj. Tsi stias kio nomizatas sinkontrolo! Tsi sertŝas senpezigon apud la juda Profeto, Kiu parolas la veron, kiu estas la Vero mem, tŝu ne?» Joram ridetas. Tŝu li ver-džuste rezonis? Tŝu li realetse solvis la problemon, starigitan de lia tŝirkawažo?

Li formizas la intentson forrifuzi non Jadus el sia hejmo. Non Edisa li refoje admonos, ledžotekstojn enmane. Kaj plu ne invitos non Filok tiel senpripense. Al vojadžado li diros adiaŭ: lia posteno estas tŝe la filjino.

En Jeruzalemo li tsetere devas plenumi taskon.

Jam dum la unuaveninta kunsido de la Alta Konsilio li ekkaptas džin. Pritemas la Nazaretanon. Joram pledas por la awtentetso de Lia misio kaj maljesas ke Li volas pretendi sin Dia. Tuje senkatenigas sin ripostado: dudek membroj samtempe interrompas lian pledon.

– «Mia Patro kaj Mi, Ni estas unu.» Tion li diris

en la Inawgurffesto!” oni rebatatsas al li. “Tŝu tio ne estas klara lingvaŝo?”

– “Klara kiel la vatro de Ŝiloax, por tiu kiu volas kompreni,” deklaras Joram. “Kiel Mesio la Profeto estas unu kun Jehovo, plenumante Ties volon. Lia volo estas unu kun tiu de Lia Patro, Kiu akseptis Lin kiel Filjon. Jen la signifo de Lia eldiro, kaj neniun alian al ni konvenas doni. Tŝar neniun mi awdis sensentsaŝojn el Lia buŝo; tŝiam Li pronontsis parolojn de plej alta vero!”

Grego blekado mudŝas kontraŝu tiud-tŝi bravado opinio kaj Joram devas muti. Tamen ne tŝiuj opono staras. Ke li ne kredas je dietso de la Galilujano, kaj tamen trovas elturnon por ties diraŝoj, ritsevas aprobon de tiuj hezitemaj dubantoj. Joram rimarkas tion. Espero fluas en liad korodo, espero ke li varbos novajn membrojn por agnoski la mesian redŝetson de Jesuo; lia batalpretetso rekreskas.

Multe da Jeruzalemano kaj awdis pri la sinteno de Joram en la Alta Konsilio. Kiam la rabeno sur la Templo Platso sid-igas sin, ili stivole alŝovas sin. Estas firmaj kredanto kaj dubemuloj; estas nepraj malamikoj kaj mokantoj. Estas tie seriozaj sertŝantoj, trankfilaj rezonantoj, kaj furietsaj debatantoj, rapide pretaj por kapti ŝtonojn kaj bate levi la pugnojn. La templogardistaro devas surstsenigi sin. Joram varbas sekfantojn inter tiuj kiuj fidas je la aperinta 'Savanto', kiu baldaw prenos la regopotentson enmane. Liaj paroloj tamen, pri 'spirita potentso' repuŝas multuajn. Lia 'adoptita Filjo de Dio' igas la agnoskantojn de 'vera Filjo, mem Dio', malfide paŝi returned.

Joram estas tselo- kaj tsentropunto dum la viglaj diskutoj en la Alta Konsilianaro. Depost kiam Sarea divenis ke la edzidžoplano por lia filjo estas travidita kaj vanigita, li denove staras flam-okule kontraŭ nod Joram. “Defendanto de malnobla honororabisto vi estas!” li krias al ties vizadžo. “Rabisto la Galilujano estas avan tŝio, tŝar li konspiras kun la Zelotoj, kun tiuj *lestes*, vivantaj de rabado. Kaj rabisto de honoro, tŝar la honoron li forkaptas de tŝiuj superuloj, káj de la Plejaltulo káj de la Romena Imperiestro!”

Okazon por respondi oni ne tsedas al Joram. «Ili konas sole sentojn de malamo kaj de vendžo, tiuj konsilianoj,» li pensas soletse. – «La Nazaretano senmaskigas ilian hypokritetson, ne flatrigardas al ili, iras sian propran vojon kaj vivas strikte law vero kaj justo; tio, kaj nure tio, elpremas al ili la galon. Kiel do Li, la Santulo de Jehovo, plejkarulo de la Tŝielo, forkaptus la gloron de Dio? Kiu do kondamnis tiujn avanajn malverajn mesiojn, ki-am tiuj same pretendis sin 'Filjoj de Dio'? Kaj la honoron de la Romena Imperiestro! Ŝajnhoneste vi povas krei tion, Sadukanoj! Tŝiu ajn Judo ja levas la Mesion absolute super imperiestrod; tŝiu ajn Judo abomenas la despoton kiu kuradžas nomi sin dio!»

Joram fatsile flaras: dre lia dorso fordžatas planoj, pridiskutatas argumentoj kaj preparatas taktikoj por kawzi fiaskon de la Nazaretano. Estas argumentoj por la popolo, kiu glorizas Jehovon super tŝiu kaj super tŝio; estas argumentoj por la Romenoj, kiuj eventale devos aprobi kondamnon, Vundita orgojlo kaj timo je

senkreditigo restas dawre la fonto de iliaj ruzaj fifaroj!

Mesianisma ribelo? Tiun oni espektas, pridubas nek Joram, nek la aliaj Prezbyarxoj. Sed li ne malpli tsertas, ke tiu-tŝi, la vera Mesio, kapablas neniigi etŝ la Romenojn. Vidu, per multigado de pano Li povas nutri Siajn militistojn; monon Li povas fiŝkapti el vatrofluoj; kripligitajn Li povas kuratsi dŝis sankorpetso, kaj la popolon Li tenas fastsinita. Tŝion Li posedas por gvidi ribelon dŝis suktseŝa kulmino. Sed tŝu Li tion ankaw volas?? Dawre Li rifuzas la redŝan kronon. Lojale pagas tributon al la imperiestro. Predikas spiritan ekstaron kaj ne politikan ribelon!

La tuta argumentado de Joram kun la konsilianoj kolektas nur malamon kaj insultovortojn.

«La Profeton oni devas averti,» detsidas la rabeno. «Li konsilos Tiun paroli malkaŝe pri Sia tselo kaj Sia persono. Montri al Li la dandŝeron perej profare de la Prezbyarxoj kaj kune kun Li la Mesiana Vokidŝo.»

Semajnojn longe furietsas la batalo en la Synhedro. Neniu plu kuradŝas malkaŝe apogj non Joram.

Tiam, subite: la konsternega novaŝo pri revivigo je-de Lazar, la ritŝega Betaniano, pro kio tŝiuj brakoj en Jeruzalemo puŝatas supred.

Senprokraste la tŝefpastro kunvokas la Konsilianaron.

– “Kion ni faros!?” demandas Kajafa. “Jena viro praktik-umas amason da iluziaŝoj. Se ni tion plu permesos al li, tŝiuj kredos je li. Venos la Ro-

menoj kaj detruos nian urbon kaj nian popolon!”

Tŝiu membro staras perpleksa.

– “Vi komprenas nenion!” li tondras. “Tŝu do ne venas al vi en la pensoj, ke unu homo detsas perei por la popolo, por ke la tuta natsio savatu?” Joram salte levas sin kun kuradĝo kaj ard-okuloj de venk-onto. Per apenaw subigata jubiltono en la votŝo li elkrias:

– “Jen kion Li kapablegas, la Korfavorato de Jehovo, la vera Mesio! Vi timas ribeladon, sed nian helpon Li povas fatsile ignori por fondi Sian regnon. Manpleno da lojaluloj sufitŝas al Li, tŝar etŝ Siajn mortintojn Li stias revivigi por masakri la malamikojn. Kaj Jehovo atestas favore al Lia instruado per tiu-tŝi miraklo. Estas urdĝa tempo por ni tŝiuj anigi sin al Li kaj glorizi Lin kiel nian Mesion; deklari Lin Redĝo de Israel!”

Kajafa alrigardis la parolinton kiel furietsa besto sian predon. Malantaw la flamanta frunto de tiu-tŝi Sadukano, kiu neniam kredos je la fina Relevidĝo, fulmas kaj ardegas pensoj, kiujn li klopodas ordigi:

– “Sentserba vi estas, Joram, kaj malinda instruisto de Israel, pronontsante tiajn fiparolojn! Kiu ja tsertigas al ni la awtentetson de tiu-tŝi lawnoma mirigaĝo? Tŝu vi do neniam awdis pri homo kiu, post tri tagoj de ŝajnmorto, restaridĝis vivanta? Kiu povos nei ke tiu deluranto akiras tŝi-maniere rimedon por entuziasmigi la amason? Miraklo? Tŝu tiu Lazar ne estas intima amiko de la Galilujano? «Tsi rolifu kiel mortinto kaj mi revivigos tsin,» ili kredeble interkonsentis. Tŝu la Mesio? Ne! Alia konkludo trudas sin: la

Galilujano taksas proksima la momenton en kiu li kun siaj amikoj en la Partio de Liberetso kaptos la potentson. Miaj karaj kolegoj, tion ni nepre malhelpu! Nur unu rimedon: eksekuto, la eksekuto de krimulo! Ni devas kapti lin kaj tiam devigi la Romenojn kondamni lin kiel ribelanton. Finite, *xalaz!* Kiu konsentas, tiu ekstaru!

Nur tri inter la tŝeestantoj restas sidantaj: Joram, Nikodem, kaj Josef el Arimathea. Pro timo je mistrakto aw elpelo, tiuj tri rabenoj forlasas la konsiliejon.

Hurlado kaj malbenado eksplodas dre iliaj dorsoj. Kune ili hast-fudžas el la Templo, rapidas tra la Ŝafpordego kaj sentas sin resekurigitaj nur post kiam ili supred iris al la domteraso de Joram.

Apenaw estas ili sidigintaj sin, aw jen supred sturmas iu la ŝtuparon, ŝtupojn trioje – Filok.

– “*Rabi*, mi tŝeestis! Tŝu vi stias kio okazis!?” krias la junviro ardaplene. “Ho, mi petas pardonon!” li postediras al la unuavide ne rimarkitaj kunuloj de Joram. “Sed mi spektis, mi estis surloke!”

– “Saluton al tsi, Filok, post tsia longa foresto. Sidigu tsin. Kaj rakontu al ni. Tŝu temas pri la revivigo de tiu Betaniano?”

Filok ignoras la inviton kaj staras plu, nerveme: “Vi jam stias? Morta li estis, kaj nun li ree vivas! Via Mesio, via Dio redonis al li la vivon!!”

– “Tsi ritsevis fortan impreson, Filok.”

– “Impreson? Impreson! Jes, mi ritsevis impreson, impreson! Nun mi devas tŝizadi! Nun mi devas eklabori!” Filok duone turnas sin, ekante for.

– “Filok! Tsi ancoraw nenion rakontis al ni. Eksidu tamen, kaj informu nin pri la viditaĵoj!”

La junviro nun eksidas sed silentas kelke da momentoj. Mi sekfis Lin, moŝta Joram, sekfis Lin tra tuta Pereujo. Mi vidis Lian maldĵojon, sintseran aflikton, kiam oni portis al Li la stiigon: «Tiu kiun Vi amas, estas tre malsana.» Sed la sufero malaperis kiam Li rigardis supred al la Tŝielo kaj proklamis: «Tiu-tŝi malsano servos por glorizi la Filjon de Dio.» Kaj ni tŝiuj estis mirfrapitaj tŝar Li ne tuje ekiris. Sed poste Li tamen ekvojadĝis. Lawlonge de la vojo Li felitŝigis ancoraw multajn. En Betania la homoj lamentis kaj ploris, tŝar Lazar estis mortinta jam kaj entombigita. Lia kadavro ja komentsis odoratŝi. Tiam Li admonis la senesperan fratinton: «Tŝia frato relevidĝos... Mi estas la Relevidĝo kaj la Vivo.» Kaj ŝandĝidĝis Lia vizadĝo, kfazaw elinterne io liberidĝis alekstere. Ne priskribebla majesto envolvis Lin. Kun la parentsoj de la mortinto Li iris al la tombo; kaj Li ploris, profunde tuŝita. La enirejan ŝtonegon oni rulis flanked. Kadavra fetoro elfluis. La Sinjoro rigardis tŝieled kaj predĝis. En tiu momento mi spektis la plej misteran bildon kiun oni povas imagi. Flamo ŝajnis en Li bruligita, la flamo de dietsa Art-isto, disradiana profundan sadĝon kaj gigantan kreopovon. Nedireble belega estis Lia aspekto. Dignege kaj glоре konturita kontraw la smeralda fundo de palmarboj. Santega mistiketso radiis el Lia estaĝo. Lia rigardo penetris en aliad mondod, nekonata de ni. Lia frunto brilis per miriga lumo. Tuta Lia staturo estis unusola sublima potentso,

libera je tŝia homa malforto. Ŝajnis al mi ke Liaj piedoj ne tuŝis la teron, kiam Liaj brakoj solene levatis. Tŝu tio estis ancoraw votŝo de homo? Sonorpure kaj harmonplene Li ordonis: «Lazar, elvenu!» Tion mi vidis, tion mi awdis. Tŝu impreson? Mi ancoraw vidas Lin antaw mi, tiun supernaturan Viron, portantan la potentson en okulo kaj buŝo kaj frunto, ordonantan tiel awtoritate kaj tŝionrege. Homo plena je belo, la belo mem, la bono, la vero! Tiun impreson mi gardo-tenas kaj kuŝigos en...”

– “Jesja, en statuod, tŝu!? Sed diru, kio okazis kiam Li vokis «Elvenu!»?”

– “Tiam? Tiam Lazar ekstaris. Li levis sin; unue en sida pozitsio, poste sur la piedoj. Li venis ekstered kaj falis surgenu antaw la Granda Instruisto. Oni disigis la volv-aĝojn de liaj piedoj kaj li iris for, hejmed. Kaj mi... mi restis staranta tie. Longe, mi pensas, kaj senmova. Kaj tiam forire ekkuris, tied-tŝi, al mia laborejo, tŝar tŝizadi mi nepre devas, jes, nepre nepre devas, senprokraste...”

Filok kuras for, subed law la ŝtuparo. La tri maljunuloj postrigardas lin, dŝis malapero en la labordomo. Tiam ili ree mallevas sin en siajd ripozosedĝojd, mutigitaj.

– “Tiu viro...?” fine stivolas la Arimateano.

– “Tiu viro estas pagano,” gruntas Joram, “kvazaw al si mem.”

– “Sed li kredas je la dietso de Jesuo!” rimarkas Nikodem.

– “Jes, li estas pagano,” ripetas Joram.

– “Pagano kiu kredas! Kaj ni nĝ kredas!” Eviden-

te, Nikodem espektas kredokonfesion de Joram ankaw. Li rigardas al tiu en dĵoja atendo.

– “Pagano povas fari al si novajn diojn. Israelidoneniam! Jehovo sola estas Dio!” emfazas Joram firmavotŝe, kaj tio sonas preskaw kiel riprotŝo.

– “Tiu kiu stipovas..., kiu kapablas viviĝi mortinton...” rekomentas Josef.

– “... estas Sendito de Jehovo. Favorato de la Tŝielo. La Mesio!” kompletigas Joram.

Josef kaj Nikodem ŝetas rigardon unu al l'alia. Ili silentas. Tŝiuj tri silentas longatempe.

– “Li ne mortu!” diras Nikodem.

– “Vivi li devas kaj liberigi nin,” opinias Josef.

– “Redŝo de Israel Li devas estidŝi,” aldonas Joram siavitse.

Denove falas silento sur la teraso.

Josef kaj Nikodem ekstaras, salutas, kaj iras, mergitaj en profundaj pensoj...



Konsternega Respondo

– “Tedegas min, kisi la piedojn de Joram! Venas al mi dĝis la gordĝo ritŝigadi lin! Sufoku li en sia mono! Ke lia filjino eklodĝu en la Gehena! Kiel ordinara sklavo mi staras en lia magazeno! Nek lian domon nek dĝian enhavon mi volas iam revidi! Sufitŝas jam, patro, estu finite!”

– “Kfiete, Jodus. Estu trankfila, mia knabo. Ankoraw nur kelkajn tagojn, eble etŝ nur unu tagon plu. La vendĝo alproksimigas sin. Dĝi estas tie. Dĝi estas tie-tŝi. Al Jehovo la vendĝo! Kaj la Tŝielo utiligos nin por dĝin plenumi. Tŝu tsi stias ke Joram aklamis la Nazaretanon, hieraw tŝe lia Granda Eniro?”

– “Antaw miaj okuloj li staris tie. Sian mantelon li sternis antaw la hufojd de la azenino. «Hoŝană!» li kriis. «Hoŝană al la Filjo de David!» Kfindekfoje. Li radiis pro dĝojo. Tserte li kredis: «Nun estas okazonta! Nun la tŝarpentisto suriros la tronon!»

– “Naivuloj! Kfazaw tio eblus sen la Alta Konsilio! Sed redĝo li ne idĝos! La popolo ja fine rimarkis ke dĝi estas trompata. Tion ni dankas al la Konsilianaro. Do stiu: la horo de la Nazaretano alvenis; ne por supred iro, sed jes por malsupred iro tied kie regadas la vermoj. Post kiam la Paskofesto estos tselebrita, tiam... Sed ankaw Joram... Rigardu, li jam agnoskas la Galilujanon kiel redĝon, kaj baldaw same kiel diulon, tion mi

awguras. Mi tsetere trudos lin al tiu direkto. Tiam estos la momento! Tŝu idolano povas resti rabeno? Tŝu veraj Israelidoj povas atŝetadi tŝe malfidelulo? Tŝu ne aperos iuj ardaĵ fideluloj por ŝtonifi lin? Tiam nia tempo estos veninta, Jodus! Sole mi ankoraŭ kapablos deturni lian sorton. Sed tiukaze ni starigos nian kondiĉon: Edisa por tsi. Ankoraŭ nur mallonge tsi devos pretendi obeemon, mia filjo, ankoraŭ nur mallonge; tiam venos la rekompento!”



La avanan tagon Sarea kaj kelke da konsilianoj iris al la abomenata instruanto en la Templo. Ili postulis de li kontentigon pro la elpelo de komertistoj el la Templo, pri tiu ago de aŭtoritato, farita sen oficiala permeso.

Fibrave Sarea polemikis, sed li devis honte retiri sin je la tikla kontraŭdemando de la Nazaretano. Tian humiligon li plu ne volis suferi. Kaj tamen oni devis ekagi nome de la Synhedro, pro la pruvoj kontraŭ tiud lertad mal-amikod. Subite eklumis al Sarea.

La pastraj printsoj kunvenintaj kun multe da kleruloj, kolektis kaptodemandojn por povi eltiri ion konkretan el la buŝo de tiu aroganta vipanto, io kio igos lin kulpigebla, por poste antaŭ la popolo brulstampi lin kiel instruiston de falsa doktrino.

Sarea ritsevis la taskon organizi la debaton kiel eble plej efike. La Herodanoj kaj ankoraŭ la Sadukanoj jam stiis siajn rolojn. Tiam Sarea

ekpensis pri Joram.

– “Tŝu ne vere, *Rabi* Joram, vi volas stii tŝu la profeto kiun vi honoras, instruas diajn veraĵojn? Vi volas pli perfekte koni lian mision? Ekstii tŝu li venas de Dio? Iru do kun ni kaj levu vi la gravan demandon de la Tŝefpastro. Viaj sadĝetso kaj prestidĝo povos el tio multe profiti.”

– “Ke Li venas de Dio, tion mi jam stias,” respondis Joram sendĝene. Avan du tagoj mi awdis votŝon el la Tŝielo proklami: «Mi glorigas Lin kaj Mi denove glorigos Lin.» ”

– “Vi kredis awdi,” korektis Sarea. “Kaj deposte vi eble kredos etŝ pli, kredos ke li estas la Plej-altulo mem!”

– “Ne,” kapsignis Joram.

«La viro estas singarda,» pensis Sarea. «Tŝu li nutrus suspekton?»

– “Vi do faros la demandon?” li insistis. Joram ne kontraŭstaris.



Miro frapas la kolektivon de pastroprintsoj kaj sadĝuloj, kiam ili awdas la respondojn al tŝiuj demandoj de la Herodanoj kaj Sadukanoj. Kiel akraŭvida, tiu meblofaristo! Kia admirinda sagatso!

– “Donu al la imperiestro kio ŝuldatas al la imperiestro. La tributon oni devas pagi!” preskaw jubilas la Herod-anoj.

– “... kio ŝuldatas al la imperiestro,” unu Farisajo korekte provas ilin bremsi. “Sed, se la tributo ne ŝuldatas al li, se li transpasas sian awtoritaton,

tŝu ankaw tiamdo? Tŝu ni pagu por subteni lian idol-adoradon?”

– “... Kaj al Dio kio ŝuldatas al Dio,” ancoraw komplet-igas iu Sadukano. “Al la imperiestro law Dia volo, tŝar la establita awtoritato venas de Dio.”

– “Per tŝiuj-tŝi glataj vortklarigoj mi trovas nenion en la respondo por kapti lin,” gruntas Sarea nerveme.

– “Mi konkludas el ili, ke la Nazaretano ne praktikas politikan aw militeman agitadon,” rimark-igas Joram.

Malmilde oni rigardegas lin pro tiu rimarko.

Ankaw la Sadukanoj ne ridas, kiam la siedžata Nazaret-ano traktas la al ili konfiditan disput-ažon. La sepfoje vidvinidžinta virino neniel konsistigas nesolveblan problemon por Jesuo. Kiam la homoj relevidŝos el-inter la mortintoj, ili estos kiel andželoj en la Tŝielo. Estos relevidžo, ho Sadukanoj, tŝar la Dio de Abraham, Isaâk, kaj Jaâkob ja ne estas Dio de mortintoj, sed de viv-antoj!”

La farisajaj kredantoj je relevidžo kaŝe aklamas. Al Joram eliras honeste el koro, kiam li komentas: “Majstro, vi bone respondis!” Sed nun estas jam lia vitso por eksameni kaj la aliaj konsilianoj stivolege sin antawed ŝovas.

– “Kiu estas la unua ordono?” demandas Joram.

La respondo estas evidente tio kion li espektis, kaj li reprenas: “Džuste, Majstro, lawvere Vi diris ke la Sinjoro, nia Dio, estas unika kaj ke egzistas neniua alia ekster Li, kaj ke ami Lin per la tuta koro, la tuta inteligento, kaj la tuta forto, dum la

proksimulon kiel sin mem, pli valoraj estas ol tŝiuj brul- kaj butŝ-oferaĵoj.”

– “Vi estas ne malproksima de la Dia Regno!”
lawdas lin la Majstro.

Joram idžas rudŝvizadŝa pro dŝojo kaj fiero. Tŝu lia Mesio tie ne publike prenis partion por li? Per lawdo ornamis? Pravigis lin kaj lian instruon dŝis la lasta punto? Unikan Dion! Tiamaniere la Santoleizito konfesis samokaze ke Li mem ne estas dua Dio. Kaj plue: «Vi estas ne malproksima de la Dia Regno!» Tŝu tio ne volas diri kfazaw: «Mi idŝos Redŝo kaj vi ofitsos en Mia regno! ? Tu-ta lia strebado de la pasintaj monatoj kăj kontraw la aliajd Membrojd de la Istaro, ne dezirantaj tŝi-tiun Mesion kiel Redŝon, kăj kontraw nod Filok kun ties novaldono al la pagana panteejo, tu-ta tiu strebado jen klare aprobatas kaj konfirmatas. Naskidžas jubilo en Joram, kiu sento igas lin signifo-plene rigardi en la okulojd de la Membroj. Sed awskultu, la diskuto ankoraw ne finidŝis. La turmentata Majstro nun mem petas opinion de la Farisajoj:

– “Kies filjo estus la Mesio?” demandas Li.

– “La filjo de David!” sonoras tuja riposto.

– “Kiel tiamdo David, prilumata de la Inspiro, povas alparoli Lin kiel Sinjoron, kiamdo li diras «La Sinjoro parolis al mia Sinjoro: Eksidu tŝe Mia destra mano, dŝis Mi faros viajn malamikojn apogilo por viaj piedoj! Se David alparolis Lin kiel Sinjoron, kiel do Li povis esti samokaze nur lian idon?”

Joram rigididžas. Lia buŝo malfermidžas pro konstern-ego. Grandaj staras liaj okuloj.

Malrapide nur lia vizadžo malstretŝidžas. Li pripensas: «David – en perfekta submetidžo al la Mesio – David alparolas la Mesion kiel sian Sinjoron! Sinjoro, Kiu tiel devis egzisti avan ol David kaj antaw Kiu la profeta redžo humiligis sin. Tiu Sinjoro... estas Jehovo! Kaj la Mesio... tŝu Dio mem!?

Silente kaj mute Joram staradas. Senmove staradas ankaw la publiko. Senparole forŝtelas sin la Farisajoj.

– “Ve al vi, ŝajnegantoj! Ve al vi, blindaj gvidantoj! Ve al vi, blanke kalkizitaj tomboj!”

Dŝis sepfoje ripetate Joram awdas tiun kondamnon el la buŝo de la Instruanto. Dŝi travibras liajn ostaron kaj medolon, igas lin frosta kaj senspira. Liaj gamboj preskaw tседas. Kfankam la severa admoninto jam foriris, ancoraw restas tie Joram, kfazaw fulmfrapita.

Apudege li ekawdas sian nomon. Estas Sarea kiu ankaw staras tie kaj rigardas lin kun mok-esprimo.

– “Nu Joram? Vian plej freŝan opinion pri li?”

Joram revenas al realetso. Li deturnas sin senparole. Kun dolortrajto sur la vizadžo kaj la kapon klinite, li foriras lante. Sarea make subridas.



El la dŝardeno Edisa vidas sian patron reveni hejmed. Ŝi ektimas, rimarkante lian turmentitan vizadŝon. Li aspektas preskaw kiel dormiranto, nekontsia pri si mem. Kfazaw awtomate li iras

antawed, paŝon post paŝo supred law la ekstera ŝtuparo, tute en pensado volvita.

La knabino ne kuradžas ekmovi piedon. Ŝi vidas sian patron sur la tegmentoteraso movi sin en direkto al la ripozosedĵoj. Kio misas? Pro kio li tiel senatente preterpasis? Ŝi ekas al la ŝtuparo, sed tamen ne kuradžas surpaŝi dĵin. Tŝagrenite ŝi awskultas. Nenio plu movas sin tie supre. Ŝtupon post ŝtupo ŝi aliras la terason kaj esploras la patron eldistantse. Li kuŝas senmove, kun malfermitaj okuloj. Tŝu ŝi proksimigu sin? Ŝi ne kuradžas kaj ree malsupred iras. Senkonsile ŝi awskultas denove. Poste eniras la domon, ordonas al la servistinoj prepari la vesprmandĵan tablon kaj eksidas enprofundidĵante en malgajajd pensojd. La dungitinoj algapas ŝin konfuzite kaj flustras unu al la aliaj. Kiam Misax gestas al sia mastrino, ke la mandĵaĵoj estas pretaj, la knab-ino ree suriras la ŝtuparon:

– “Patsjo! Patsjo!”

– “Jes,” respondas li sen alrigardo.

Edisa foriras. Joram ne venas. Vesperidžas. Idžas malluma. Ankoraw li ne donas signon. Altagrade maltrankfila, sed detside, Edisa denove iras al li. Ŝi trovas lin dormanta kaj regule spiranta.

– “Dank'al Jehovo!” ŝi murmuris. Singarde ŝi sternas lanan teksaĵon sur lid. Tiam ŝi mem kuŝigas sin sur alia ripozokrefto kaj volvas ankaw sin mem en kovrilod. Dum la duona nokto ŝi maldormas; tiam ankaw ŝiaj palpebroj fermidžas.



En la mateno, kiam Edisa malfermas la okulojn, Joram estas ancoraw dormantanta. Ŝi foriras en silento. Iom post iom ŝi revenas kun la matenmandžo. La patro vekidžas kaj alrigardas ŝin distrite. La mandžaĵojn li lasas netuŝitaj. Apenaw respondas kiam Edisa provas paroligi lin. La knabino estas senkonsila. Ploretante ŝi iras rakonti al la servistinoj pri la nekutima konduto de sia patro. Egla konsilas alkonduki non Filok. Edisa mem kuras al la najbaro.

Edisa nodigas la brakojn tŝirkaw liad kapod kaj ŝi ploras kune kun li. La gardisto moke ridatŝas, insultas kaj blasfemas, kiam li venas kontroli.

Tiele patro kaj filjino sidadas kunaj, atendante kaj maldžojante, džis la sesa horo de la tago alvenas. Tiam subite penetras stranga krepusko en la tŝambrod, kfazaw rapide vesperidžus. Pli kaj pli densa idžas la mallumo. Silenteme kaj pale, timante misterajn potentsojn, la gardisto enŝtelas sin. Li eksidas apud Joram kaj Edisa, rigardante ilin kfazaw li sertŝus protekton en ilia tŝeesto.

– “Tu diris al mi: la profeto pendas... je krutso... La homoj fudžas for de la eksekutejo,” pene eligas lia seka buŝo.

Kfazaw por konfirmi tiun komunikon, ekawdigas sin optuza tondrorulado, venante de tŝie kaj nenie. Subite la tuta tŝambro, la tuta domo ŝajnas ŝantselidži, la muroj krakas, la grundo tremas; potoj, vazoj, iloj, tŝiaspetsaj varoj defalas de-sur la montobretoj, frakasidžante sur la planko. La gardisto sovadžrigarde sertŝegas ne troveblan rifudžo-angulon. Kun timego Edisa premas sin al la patra brusto.

– “La miraklo! La miraklo!” ekjubilas Joram. “Nun Li liberigos Sin mem! La Mesio! La Di-Sendito! Gloron, gloron, haleluja!”

Sed post kelkaj momentoj la terskuidžo tŝesas, same abrupte kiel dži ekis. La hejmo solide eltenis kun nur sensignifaj difektoj.

Joram supred saltas kaj volas al la pordo, kuntrenante la filjinon. Sed la gardisto,

rekuradĝigite same ekstaras, subite kontsiante pri sia responso. “Reed!” blekas li.

La ponardo brilas. Patro kaj filjino retre paŝas antaŭ tiu minatso.

En la pordego ekdeĵoras la temploservisto, bravatŝe nun, maltsede, tri longajn horojn, dum la rabeno kaj Edisa sopire rigardadas alekstere, ne bonstiante kion atendi.

Tiam ankaw la hela taglumo revenas. Mesadĝisto eniras la butikon.

– “Abia,” li diras aferetse al la gardisto, “estas farite. La Nazaretano iris al mortolando. Lasu la rabenon praktik-umi. Jen la ordono.”

Sen saluto la du judaj militistoj iras for.

Joram kaj Edisa kun krieto falis en siaj sedĝojd, awdinte la teruran novaĝon. Ili jam nur povas plori, ploradi.



Tiun vesperon lawdeve ili mandĝas la ŝafidan viandon kun amaraj herboj kaj nefermentinta pano. La tseremonio estas kurta kaj sen festa etoso.

Revivigo

Kun la unua galiluja karavano, eliranta la Ŝafopordegon en la frumateno post tiu Ŝabatotago, Joram kaj Edisa fudžas la malsekuran, fanatan Jeruzalemon.

Ilia vojadžo pasas tra Jerixo. La novažo pri krutsomorto de Tiu, Kiu balzamis malfelitŝon en tiom multe da koroj, alportas grandan konsternon en la Jordan-urbo. En Pella de Pereujo regas malpli da bedawro pri la okazintaĵoj: tie la enigma Mathan instigas la lodžantojn al malami-kaj sentoj. En Tiberias, hejmloko de Izboret, la rabeno ne volas haltoresti; plued li vojadžas, dĵis Kapernaum. Tie li estas malpli konata kaj troviĝas en proksimetso de la ŝiria landlimo, kiun li se bezone povus transiri. Tsetere, tiuloke li povas trovi ripozon apud la freŝiga lago kaj sendandĵere kolekti opiniojn de la homoj.

Al dekoj da ili li starigas saman demandon: “Tŝu vi povas kredi ke homo estas Dio?” La urbanoj baldaw taksas lin mense tawzita kaj subridas jam kiam ili vidas lin alveni.

– “Tŝu homo Dio, oldulo?” mokas la strataj bubatŝoj. Tute serioze la maljuna rabeno sin turnas kaj demandas tŝu ili tion kapablas kredi. “Ne, ne, tio ne eblas!” rediras iuj, pretendante konvinkon. – “Kial ne? Tŝio ja eblas!” ŝajnigas aliaj. Kiel la infanoj, tiel la plenkreskuloj. “Ne, tion mi ne povas, bona viro!” Sed trovidžas

ankaw iuj felitŝuloj, kuratsitaj de la Nazaretano, aw parentsoj de la ditŝiploj, kiuj parolas malsame. “Jes, jes, tion mi povas, tŝar Li tion tsertigis!” atestas kelkaj kun firmetso. Inter tiuj estas homoj junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj, superuloj kaj fiŝistoj. Sed al tŝiuj mirigas, ke tiu teda Judeano persone montras nek aprobon nek mal-aprobon; ne por l'unuj kaj ne por l'aliaj. Lian propran opinion neniu konas.

Nur la alt-adŝa Jona, solidmensa kaj fortikstatura fiŝisto, pridemandas lin senpere: “Kaj vi mem, amiko, tŝu vi povas kredi tion?”

– “Tŝu mi?” demandas li, sen miro pri tiu rebato.

“Mi? Kiel mi do kredu ke homo povas esti Dio?”

Tio estas nek ne, nek jes. Pli dŝuste, estas peto pri lumigo, kun iometa emfazo sur «Kiel?». Rematŝanto li estas, oni opinias, fiks-pensanto, kiu dawre kuras kun la samo en kapo kaj buŝo.

Iun tagon aperas la filjo de Jona – Simon estas lia nomo post longa foresto el la urbo tŝe Lago Ginezareto. Tio, kion li rakontas, ardigas tŝiujn spiritojn. Jesuo el Nazaret denove trovidŝas inter la homoj! Li levidŝis vivanta el Sia tombo! Dŝojigitoj kaj ŝokitoj, kreantoj kaj dubantoj, tŝiuj kunkuras al bordo de la granda lago. Same kiel avan pluraj jaroj, Simon refaras sian fiŝkaptan metion sur la patra ŝipeto, asistata de sia frato Andreas, de siaj amikoj Tomas kaj Natanael, kaj ankaw de la du filjoj de Zebedeus, tŝiuj estante ditŝiploj de la Krutsifito. Kaj por tŝiu awdeble ili persistas: “Nia Majstro relevidŝis! Ni vidis Lin vivanta!”

– “Pro kio do Li ne trovidŝas tie-tŝi? Pro kio vi do

ne trovidžas tŝe Li? Kion Li do farus nun? Tŝu li denove verkas miraklojn? Ke Li do venu al ni! Ke Li montru al ni Siajn vundolokojn! Kiam ni mem vidos Lin, ni kredos je Li! Ja, dŝis nun ancoraw neniŭ proprapove revenis el-de la mortoregno. Kiel do Li stipovus fari tion!?” diras la Kapernaumanoj.

Ankaw Joram iras al tiu Simon, kromnomizata «Roko», por konfirmigi tiun novaŝon. Kaj lia demando nemankeble lawtas: “Kiel vi povas kredi ke homo estas Dio?”

Simon respondas: “Tŝar Li tion tsertigis kaj tŝar Li nun Sin revivigis.”

Ripostas Joram: “Ke Li estus revivigita, tion mi kapablus kredi, tŝar la Eternulo povas relevi Sian Senditon por finfari la komentsitan mision. Sed kiel mi povus kredi ke homo estas Dio? Vi, vi estas kiel infanoj, kiuj kredas tŝion...”

Kaj tiamaniere la homoj stias ke tiu latsa, malvigla Joram tamen rezonas kaj kredas je Jesuo Mesio, sed nur ne povas aktsepti la dian naturon de tiu Profeto. Ili konjektas nun ke tiu digna viro eble estas egezegizto.



Joram aktseptis vizitanton. Kiele tiu Filok ekstiis ke patro kaj filjino eklodŝis en Kapernaum? Joram ne pensas pri tio, Edisa ne ŝajnas stivola, kaj Filok mem silentas pri tio; diras nur esti awdinta ke la relevigita Majstro restadas en Galilujo. Kiel volonte li ŝatus revidi Tiun!

– “Por tŝizi Lian statuon?” demandas Joram

duone spite.

– “Eble,” ridetas la Heleno. “Kaj vi, *Rabi*, tŝu vi ancoraw kredas je Jesuo kiel je Mesio?”

– “Jes,” senhezitas Joram.

– “Kaj, nun ke Li relevis Sin, ankaw je Lia dietso?”

– “Kiel mi do kredu ke homo povas esti Dio apud Jehovo? Tsi, pagano, estas kunsekfa en tsiaj kredoj, kaj mi povas kompreni ke al tsi fatsilas meti novan dion apud la multajd tseterajd. Sed mi...?”

– “Lasu min konfesi ion, *Rabi*. Mian polyteisman kredon vi jam delonge subfosis. Kiam mi do staris antaw via krutsifita Mesio, kun Siaj brakoj lardže malfermitaj, kfazaw Li deziris tŝirkawpreni la tutan homaron, tiam mi repensis pri la paroloj kujn mi awdis el Lia buŝo en la glora enirtago: «Kiam Mi estos de Tero levita, Mi tiros tŝiujn al Mi.» Ankaw mi en tiuj momentoj sentis min tirata al Li far-de granda forto, kaj mi diris: «Mia Dio, mi kredas je Vi!» Kaj vidu, tuje tŝiu restanta kredoj je aliaj dioj vaporidžis! Unusola Dio al mi postrestas, nur unu: Jesuo, la posedanto de tŝiuj noblaj etsoj en perfekta grado. Li sola!”

Joram videble kortuŝatis pro tiuj paroloj. En liaj okuloj kreskas larmovatro kaj por kaŝi tion, li metas la manplatojn kontraw siad vizadžod. Tiele li restas kelkatempe sen paroli. Poste li levas la kapon:

– “Filok,” diras li, kaj en lia votŝo kuŝas plu neniom de la iama majstro, kiu aplombe stipovis diskuti, sed male vibreto de admiro kaj de respekto kune, “Filok, vi vidis Lin mortanta?”

Rakontu al mi, kiel estis Lia morto?”

La juna viro mallevas sian kapon penseme, kfazaw li volus vive repentri al si la stsenon sur Golgota.

– “Tutan la protseson antaw Antonia mi tŝeestis,” komentsidžas lia rakonto. “Tutan la vojon, kiun Li trastumblis kun la pezegaj traboj, dżis la Kranio-Monteto. mi paŝis en Lia proksimažo. Dum tri horoj mi staradis mal-fore de Lia krutso kaj ne povis deturni la okulojn. Mi diras al vi, *Rabi*, tiele ne mortas homo, tiele povas eniri la morton nur iu dio. La kondamnon kaj skurdžadon, la insultojn kaj batojn Li firmavole toleris, la kruts-iron Li faris kun plena volonto! La morton mem Li aktseptis sindone. De amaretso aw elrevidžo neniuj spuro. Tiu longadawra suferego solidigis en mi la konvinkon, ke Li intentse lasis butŝi Sin, butŝi kiel oferŝafidon. Ja nur unu vol-ago de Li, unu gesto, kaj tuta tiu horora turmento estus forviŝita! Iu interna mistero puŝis Lin tŝedi la venkon al tiuj malnobluloj. Tiel mi pensis kaj repensis. Tŝiumomente mi atendis demonstron de Lia potentso. Sed tiu miraklo ne manifestis sin. Aw tamen, dži manifestis sin: Lia morto mem estis plej forta mirigažo, kaj la naturo kunsuferis, kiel tŝiuj spertis. Ne petu de mia klarigon, tŝar mi ne povus tiun doni. Sed en la koro mi sentis, mi stiis, ke la Altetsa Estulo tie je la krutso libervole kaj pro amo rezignis je Si mem, obeante al iu Supera Potentso, kiun mi ne konas.” Filok silentas kaj kfazaw en trantso rigardegas en la spatŝod. Kun klinita kapo Joram awskultis kaj nun

sidas plu, kfazaw li ne estus rimarkinta ke la juna viro jam tĥesis paroli. Edisa neniun vorton pronontsis, sed ŝiaj okuloj sentĥese estis direktitaj al Filok. Tĥio aperas al ŝi kiel sondĥa bildo, ancoraw dawranta. Ŝiaj rigardoj gluidĥis al la buĥo, kiu tiel allure priskribis, tiel en agordo kun ŝia propra koro. Plena je admiro por la rakontinto, ŝi ŝajnas plu trinki liajn parolojn. Etĥ ne unu momenton venus al ŝi el la pensoj, flegi alian opinion ol tiun de Filok. Jen la juna viro rektigas sin iom kaj iliaj rigardoj interplektas. Lia mieno helidĥas, milda rideto ekludas tĥirkaw lia buĥo kaj liaj okuloj nevole ritsevas teneran esprimon. Edisa estas kortuĥita. Sur ŝia vizadĥo kreskas rebrilo de felitĥo. Ambaw gejunuloj surprizite kontsiidĥas pri tiu kunsento kaj ili mal-levas la palpebrojn. Dĥenite ili tiam rigardas la tserbifantan rabenon.

Kiam Joram relevas sian kapon, rimarkeblas dolora trajto, preskaw onidirus spasma de malespero, sur lia vizadĥo:

– “Tiu morto, Filok,” diras li, “probable estis morto de nekutime volforta personetso; sed ne netsese fenomeno supernatura. La kromdetaloj, de vi mentsiitaj, sendube estis nur produkto de via artista imagemo. Tsetere, trovidĥas paradokso en via deklaro: unu Dio, vi asertas – Jesuo – kaj tamen Li mortis foroferante Sin al iu Supera Potentso. Kiu potentso estus do tiu?”

– “Majstro, Li ofte parolis pri Sia Pat...”

– “Tiu Patro de via ununura Dio ja devas esti egalulo de la Filjo; tio faras du diojn! Ne, Filok! Evidente vi sidas ancoraw volvita en la teksaĥoj de

via pagana gediaro. Kiel oni povas kredi ke mortema kreitaĵo estu Dio mem!?”

– “Li revividĝis, kiel Li avandiris, Rabi !

– “Jesjes... *xalaaz*, sufitŝas! Rakontu al mi plivole pri la Konsilianaro.”

– “Sarea kaj pliparto el la Synhedraj Membroj aspektas kontentaj kaj mokridas pri la relevidĝo. Kajafa onidire koler-eksplodas kiam li ekawdas etŝ nur la nomon de Jesuo el Nazaret. Nikodem kaj lia amiko Josef estas elpuŝitaj el la Konsilio, io kio tserte estus okazinta ankaw al vi, se vi restintus en Jeruzalemo. Por la tsetero oni neniel dĝenas ilin.”

– “Tiel do vi pensas, ke ankaw min oni lasus trankfila, se mi reirus al la tŝefurbo?”

– “Jen mia opinio, *Rabi* .”

– “Patsjo,” nun aldonas Edisa, “ni eble reiru kun Filok?”

– “Tion ni faros, mia filjino.”

Impona Statuo

En sia artmetiejo sidas Filok sur trikrura sedĝeto, rigardante eldistantse la plej junan blank-tonan skulptoverkaĝon, al kiu li ancoraw volas fari retuŝon. Tŝu li konsideru sin kontentigita? Tŝu la preskaw homgranda figuro sur ypsilon krutso

impresus al koro kaj spirito? Per klara lingvaĵo? Tserte, dĵi devas fari efikon. «Pli nete kaj fidele mi dĵis nun ne suktseŝis rekrei la admirindan figuron de Jesuo el Nazaret. Estas ja la turmentata, sufereganta, malhome mistraktata martiro je la krutso. Ŝajnas kfazaw la muskoloj ancoraw tremas, tŝiuj tendenoj ancoraw stretŝidĵas pro doloro. La supred tiritaj kalkanoj tŝe la najlego, la spasme kurbigitaj fingroj, la torditaj brakoj, la elartikigitaj ŝultroj, tŝiu tiu tordidĵanta kaj ripozon sertŝanta korpo – tiel mi ensorbis la neforgeseblan stsenon. Supre de la eltŝerpita torso, kontraste kun la dise starantaj sangogluitaj harstrioj, pendas la vizadĵo:: Sen ia signo pri vendĵemo aw malamo, dĵi dawre regas tŝiujn suferojn kaj tradukas nur libervolan submeton kaj kontsian rezignemon. La spektanto povas legi *dajasadvon en tiuj trajtoj; en tiuj sangoplenaj, duonfermitaj okuloj kaj dissternitaj brakoj altirodeziron, kiu instigas onin doni sin al la granda tŝirkawpreno, en plej sublimesimo amo al tiu aminda Suferanto.»

Filok levis sin dum sia kontemplado kaj lante proksimigas sin al la krutsobildo.

– “Mi kompatas Vin,” diras li duonvotŝe. “Mi admiras Vin. Mi dankas Vin, Jesuo!”

Li metas brakon tŝirkaw la skulptaĵod kaj kun respektigo kisas la malvarman frunton.

– “Sinjoro,” diras li, viŝante larmojn el siaj okuloj, “Sinjoro, ion pli tawgan mi ne kapablis. Mi estas tro mallerta por redoni la ne mezureblan amon, kiun mi sentis en Vi dum Via torturo. Mi ne stipovis skulpti la ardegon de Via dietso, tiel alte levi-

ta super mia mizeratŝa homa naturo, tiel vaste transpasante mian senvaloron, mian senpovon. Sinjoro, pardonu min!”

Filok nun tenas la manojn falditaj, dum li ankoraw kelke da momentoj opservas la Krutsifiton, džisfunde kortuŝite. Tiel starante, li rekonsideras siajn provojn de la pasintaj monatoj, siajn avanaĵajn statuojn, kaj jen tiun-tŝi plej novan. Lia spirito komentsas vagi for. Enreve li vidas sin mem sidanta en strangaforma veturilo. Per tiu li volas antawed, sed la vojo estas ege kruta. Rigardu, tie aperas nekonata viro sur la vojo; bela homo. Tiu etendas unu manon kaj donas malfortas ekpuŝon al la tŝaro. Ne, ne malforta, tŝar nun lia veturilo rapide rulidžas supred kaj atingas la kreston. Tie kuŝas granda blanka ŝtono. Kfazaw por distri sin, Filok komentsas prilabori džin. Kaj el la bloko li tŝizas bildon. «Tia estis la viro kiu helpis min,» diras li, kiam la verkažo estas finita. «Ne,» li tuje korektas, «tia li ne estis, li estis multe pli bela.» Sammomente Filok kontsias ke li devas veturi plu. Tie kuŝas la vojo. Li grimpas al džia supro. Pene oprogresas la veturilo. Denove li renkontas la enigman viron. Ankoraw pli bela tiu nun estas; kaj tute bona. Tion Filok stias kun tsertetso. Ree la silenta viro donas puŝon al la tŝaro, kaj rigardu, ankorawfoje dži pro tio rapidas supred. Denove kuŝas tie ŝtono, kiun Filok transformizas en statuod, en bildod de la survoja helpanto, pli belaspektan ol avane. Sed Filok pertseptas ke ankoraw ne estas finite; li devas plued: ree kruta vojo levidžas antaw li. Lante li opro-gresas. Trian fojon aperas la misterulo. Tiu

staras tŝe la vojrande. Filok nenion diras; etŝ ne ke li trovas lin pli glora ol iam avane. Jam li divenas la sekfon. Li kontsias pri granda interna deziro pri ekpuŝo de tiu forta kunvojadŝanto. Efektive, jen li sentas ekpremon kaj la veturado supred idŝas fatsila. Sur la pinto trovidŝas la ŝtonego kiun Filok espektis trovi. Senprokraste li ŝandŝas dŝin al monumento pri tiu viro, tiom pli grandioza ol spegulas tiu-tŝi tamen majstra ŝtonbildo. Tŝu mi do devas iri etŝ pli alted? Jes: tie videblas dekliva vojo al nova, ancoraw pli alta montopinto. «Mi ekas!» Sed neniun li nun renkontas sur sia veturvojo. Lis tŝareto ne povas plu. Dŝi restas fiksa. Sed vidu, tie, sur flanko deklivo, tiu krutso; kaj sur tiu torturilo... li, la admirinda helpanto.

Filok provas atentostretŝe studi lian vizadŝon sed... subite vekidŝas en sia laborejo. Tiu-tŝi krutso, jes, tiu-tŝi krutso! Tia dŝi estis, kfankam Tiu je dŝi pendanta pli admire impresis, multe pli admire!

La imagbildo agatsas lian perfektamon. Li kaptas tŝizel-ilon. Ie-tie li devas modifi detalon; sed la pensojn li ne suktasesas ordigi, la manojn ne direkti. Jen Edisa eniras lian tserbon, «Tŝu mia verkaŝo katenigus ankaw ŝin? Kaj kiel dŝi efikus al ŝia patro, se tiu hazarde ekvidus dŝin? Edisa! Joram!...» Sento de tenero surverŝas lin. Li aliras luftotruon en la ekstera muro kaj spionas al la najbara domo. Edisa kaj la Profeto? Edisa kaj tiu puŝanto – Jesuo! Tŝu ŝi estus tŝenero inter li kaj la hebrea Promesito? Aw tŝu la Mesio estus tŝenero inter ŝi kaj li? Filok ne stias. Kaj tamen

lia koro sufloras ke egzistas io kunliganta Jesuon, non Edisa kaj lin mem. Sen Jesuo neniam estus tiel forte tŝarminta lin Edisa; sen Edisa probable neniam lin Jesuo. Kiel? Kio? Tŝu egzistas solida pruvo pri tia inter-ligo? Li neniun konas. Tŝu do estus iel promeso? Li ne kuradžas formuligi tian... Jen ŝia bildo, de li modlita kaj tŝiam tŝe li en la laborejo staranta. Li dŝin eklevas kaj kuŝigas en sia brako. Doltŝe li karesas dŝin per la fingroj; dŝin kisas. Li nee skuas la kapon. « Ŝi ja estas Judino,» argumentas li «kaj mi nur... ne, plu ne pagano, sed tamen por ili gojo, fremdulo. Neniam ŝia patro donos ŝin al Heleno, kiu agnoskas Jesuon kiel Dion... Pro kio Joram ne kapablas ekkoni Dion en sia Mesio? Du diojn li ne povas aktsepti, li tsertigas. Nu, ankaw mi ne faras tion. Jesuo estas mia sola Dio. Kaj la 'Patro'? Mi ne stias. Mi ne povas indiki solvon al Joram. Mi povas diri nur: mi kredas tion kion mia koro diktas. Sed Joram ne havas orelojn por tia lingvaŝo. Tŝe li devas paroli la intelekto; la rabeno volas ratsie kompreni. Ke la Mesio, por pruvi la propran deklaron, fordonas Sian vivon, tio ne sufitŝas al li. «Kiel mi do kredu ke homo estas Dio?» li ne tŝesas demandadi. Jes, kiel, kiel?... Tŝi-maniere la doktrino dawre fortenas min de Joram,... kaj de Edisa.»

Iu diskrete signalas tŝe la pordo de la skulptejo. Filok haste remetas la buston. Lia koro martelas. Tŝu ŝi..?

Jes; estas Edisa.

– “Patsjo iris al sia butiko en la urbo,» diras ŝi rapide. “Sed mi ne povas atendi lian revenon; mi

devas nepre rakonti al iu la grandan novaĵon. Tŝu vi jam stias dĵin?... Ho, kio estas tio!? Krutso kun kondamnito! Ho, Filok, Filok, tiu estas... Li, Li, Jesuo el Nazaret! Ax, kiel simila! Ax, kiel dolore! Kiel mistera tiu Krutsifito! Ho, Filok, vi skulptis nian Mesion je Sia krutso! Vidu: Li alrigardas min! Tŝu al vi, al vi... Li diras nenion, Filok? Ho, Filok...!”

La knabino estas ekster si mem pro l'ekvido de tiu martira figuro, klinita al la rigardanto. Ŝ ne povas ne malfermi la brakojn en predĵa pozo kaj falas sur la genuojd. Ŝi rampas al la Krutsifito kaj kisas la ŝtonpiedojn. Kuntiridĵas la gordĵo de Filok. Unu momenton li demandas al si, tŝu ankaw Edisa posedas artistan animon; aliel ŝi ja ne povus tiel intense impresati de skulptaĵo. Li metas manon sur ŝiad ŝultrod.

– “Venu, Edisa,” trankfiligas li, “estas nura artobjekto. Se via patro vidus vin tiel, li kulpigus vin pri idol-adorado!”

– “Ho, ne la statuon mi adoras, ne la statuon, sed Lin, la Figuraton!” ekkrias ŝi.

Filok kondukas ŝin for al angulo, kie ŝi plu ne povas vidi la krutsobildon.

– “Edisa,” memorigas li mallawte, “vi forgesis, ke granda novaĵo pelis vin tied-tŝi. Kiu novaĵo estas?”

Pene venkante sian emoSion, la knabino nun diras: “Li ŝwebis supred, alte en la nubojd! Al la Tŝielo, oni tsertigas!”

– “Tŝu Jesuo el Nazaret, Edisa?”

– “Jes, jes, Li! La tuta urbo estas eksitita, kiel en la tago de Lia revivigo.

– “Kaj via patro, Edisa, tŝu li kredas tiun rakonton?”

– “Mi ne stias. Eble li ancoraw ne awdis džin, Filok; iru vi al li en la urbo kaj rakontu. Eble ankaw li nun kredos je dietso de la Mesio, same kiel ni!”

– “Tŝu kiel ni, Edisa!? Vi do partoprenas mian kredon?”

– “Tŝu nur vian kredon? Mi kredas je la Savanto law la Promeso. Sed tamen mi ne volas idži malfidela al la instruoj de mia patro. Mi kredas je Jehovo, la vera Dio. Mi kredas je unika Dio! Kiel tio eblas, mi ne stias, Filok, mi ne stias, ne stias!!”

Edisa vere perdis la egalpezon. Larmoj abunde fluas sur iaj junaj vangoj kaj ŝi ŝantselidžas al la pordo.

Antaw la statuo de la Krutsifito ŝi pretere levas la kapon: “Dio!” singultas ŝia votŝo, ”donatsu ke ni povu vidi klare; Patsjo, kaj mi, kaj Filok!”

– “Tŝu mi vere devas iri al via patro?” dubas la juna viro. “Kaj malkaŝi ke vi vizitis min?”

– “Ne, ne, ne iru!” nun petegas ŝi, inter larmofluoj.

Tiam ŝi reiras hejmed, provante venki la ploremon.



La historio pri tŝieled-iro de la Mesio ne tiom skuis non Joram, kiom timis lia filjino. La rabeno tamen longe pripensadis tiun okazažon, diligente foliumante en siaj skriborulažoj, sertŝegante tŝe

tŝiuj profetoj.

Dum la vespermandžo Edisa kuradžas peti lian opinion. “Patsjo, tŝu ni ancoraw povas malagnoski la Mesion kiel Dion, post tiu tŝielediro?”

– “Kial ne, infano? Ke Jehovo revivigis Lin, etŝ estus metinta sur plej altad lokod, ni povas sen hezito aktsepti. Tŝu Li ne ankaw tiele revokis non Elija al Si? Kaj tiu-tŝi Jesuo estis vera profeto, pli granda etŝ ol Elija. Sed restas ne skuebla dogmo ke Jehovo deklaris: «Mi estas la unika Dio kaj ekster Mi vi agnosku neniun dion!» Nenio kapablas malfari tiun fundamenton! Nepre nenio!”

– “Kiel do Jehovo povas subteni viron, kiu proklamis Sin mem Dio, Patsjo?”

– “Jen granda sekreto de la Tŝielo, mia infano; sekreto tŝe kiu mia prudento fuŝidžas kaj pri kiu ankaw niaj Santaj Skribažoj ne helpas nin. Spite, Lia Nomo estu benata, Lia Vorto kredata en eternetso!”

Edisa ne plisadžidžas pro tiu repondo. «Tŝu la patro, agnoskante sole nur Jehovon, estas en vero? Aw tŝu estas Filok, adorante nur Jesuon? Ax, kiel volonte mi pravigus ambaw!» Foje ŝi sentas impulson por diri: «Vi estas prava, Patsjo, kaj ankaw vi Filok estas prava.» Sed tiun aserton ŝi ne povas pruvi, ŝi, ja nesufitŝe instruita pri la doktrino, mallerta pri argumentado, kaj posedanta nur sian virinan koron kun tŝio kion la Tŝielo tie deponis.



Iom post iom disvastidžas en Jeruzalemo informo, ke la helena artisto Filok skulptis trafan bildon pri Jesuo el Nazaret sur la krutso. Ne sole ritŝaj Helenoj kaj Romenoj aperas en la metiejo apud la vilao de Joram, proponante konsiderindajn sumojn por akiri tiun majstroverkaĵon, sed eĉ stivolaj Hebreoj alt-pozitsiaj riskas rigardeton tra la enirejo. Ili konsternatas, spertante kiel tiu ŝtona reprodukto povas kortuŝi onin kaj altiri al si tŝies koron.

En sia medio ankaw Nikodem kaj Josef el Arimatea ekawdis entuziasman priskribon pri la verkaĵo. Senprokraste ili volas ekvidi dĵin. Pro la Ledžo, kiu malpermesas eniri paganan hejmon, ili petas treni la skulptaĵon dĵis la sojlo. Tuje ilin kaptas emotsiego. Respektplene ili krutsigas la brakojn antaw la brusto, sed pronontsas neniun parolon. Fine ili mangestas refermi la pordon, kfazaw ili judžus nedetse fari bruon antaw la bildo de Tiu, Kiun ili vidis morti kaj helpis entomb-igi.

Iliaj lawdoj estas sintseraj: “Nur vera artisto, kun sentema kaj humila koro, povas esprimi en bildo tiun misteran altirpovon, tiun potentson kiun ni spertis radiantan el la Krutsifito,” rimarkigas Josef.

– “Tŝu vi kredas je Li?” li tiam demandas al la skulptisto.

– “Tion mi faras,” estas la respondo. “Kaj tŝiuj miaj avanaj gedioj kuŝas antaw Li en la polvo.”

– “La lumo kiu levid as super paganoj!” revas Josef.

– “Naskodoloroj de la krutso enkondukas renaskidzon de nia perversa mondo!” dzojas Nikodem.

– “Jes,” rediras Josef, “tra Li la krutso ritsevis dian potentson por savo de la homaro!”

Ankoraw sub impreso de la spektaklo, la du skriboklarigistoj rapidas al la proksima vilao por saluti non Joram.

De-post la granda protseso ili plu ne estis intervidintaj sin; same kiel Joram oni plu ne invitis ilin al kunsidoj de la Synhedro. Ili gratulas la sortokunulon post-okaze pro ties kuradza konduto en la protseso de ilia komuna Sinjoro kaj Instruisto, Jesuo el Nazaret. Jam baldaw la dialogo ŝandzidžas al diskuto, kaj Joram levas sian stere-morfan demandon: “Kiel mi povas kredi ke homo estas Dio?”

– “La Mesio deklaris: «Mi estas Dio.» Se Li estus mensoganto, tŝu Jehovo revivigus Lin kaj levas al la Tŝielo?” ripostas Nikodem.

Joram volas stii kiel homo povas esti Dio apud Jehovo.

– “Al tiu malfatsilažo ni ne konas solvon,” tsedas Josef. “Ni diras nur, ke ni kredas je Li, same kiel ni kredas je la unika Dio de Moseo, kfankam ni ne komprenas kiel io tia estus eksplikebla.”

Kiam ili estas foririntaj Joram refalas en profundad tserbifadod. Tŝiufoje liaj pensoj konfliktas kun la propraj ratsio kaj instruitetso, kiuj tsert-igas:: «Homo, etŝ se Li estus la promesita Savanto, sidante sur la trono apud Jehovo, tio farus du superajn Estulojn!» Kun klinita kapo li vagas tra la dŝardeno kaj tra la stratoj, sertŝante malpezigon en sia magazeno.

– “Se mi nur povus kredi, kiel tiuj naivaj Josef kaj Nikodem!” li džemas. “Se mi nur povus kiel ili doni en tŝio pravetson al Jesuo Mesio!”

Al la invito de Filok, veni ankaw li rigardi la statuon, same kiel faris pluraj kolegoj, li ne reagas.

Kiel Infano

La sepa Ŝabato post la morto de la Galilujano estas festita. Alvenis *Pentahemro, la tŝarma festo de Rikolto, de Unuaj Fruktoj de la kamparo.

Jam frue Joram kaj Edisa eniris sian džardenon por enspiri la freŝan lufton matenan. Ankoraw la nokto iom sternas sian kfietetson, sed mildaj sun-radioj jam boretas tra senmovaj brantŝoj de sykomorhoj kaj tamariskoj. La birdoj žus tŝesis siajn dank-himnojn kaj la meznokta ventoblovado eloktsidenta refudžis al la maro. Lavendo- kaj malvofloroj fikse staras kun malfermitaj kalikoj, sorbante lastajn roserojn kaj vaporigante swenet-igajn aromojn nevideblajn.

Transe de la vojo kreskas malklara bruo. Estas kantado kaj parolado de pilgrimaj migrantoj sur ŝardžobestoj kaj tŝaroj, atendantaj antaw la urbopordego. Ankaw el direkto de la Temploplatso awdoŝwebas homa aktivetso.

Rabeno kaj filjino surmetas siajn mantelojn kaj

aliras la predĵejon por tŝeesti la solenan dankoferon.

La tseremonio ankoraw ne estas finita kiam desur la Antawkorto de Paganoj levidžas murmurgado, kiu iom post iom suriras la ŝtupojn de la Virina Korto, oprogresanta plie dĵis la viroj apud la Ofera Altaro.

Law sama vojo tiu subvotŝado fortidžas al zumbruego, en kiu pli kaj pli lawte rekoneblas paroloj. Estidžas intermov-idĵado de homaj korpoj, impeta kubutifado en direkto al la suda kaj oktsidenta pordegoj kaj plue en la urbod. Edisa maltserte restadas en la Virina Korto, stretŝante sian kolon por rekoni sian patron. Sur ŝtupoj de la Kunligopordego ŝi finfine detektas lin, nekomprene tŝirkawrigardantan.

– “Kio okazas?” demandas li, per gestosignaloj pli ol per la buŝo, kiam li siavitse ekvidas la filĵinon.

– “En la urbo... io kontserne la adeptojn de la Profeto!” klopodas komprenigi la knabino.

– “Oni parolas pri samumo, ventoblovego, kaj pri la ditŝiploj,” diras ŝi, post kiam la patro ŝin atingis.

Ŝi devas stretŝi la forton por resti tŝe flanko de Joram, tŝar la rivero de virinoj kaj viroj dawre pli grandidžas. Sur la vasta antawkorto ili staras iom pli liberaj. La fluego jen forkidžas, unu brantŝo direktidĵante al oktsidento kaj alia lawlonge de la Redĵa Kolonaro. Tiu-tŝi lasta puŝiro portas nojn Joram kaj Edisa al la Valo de Fromadĵistoj, kie la strato kondukas al la Palatso de Kajafa. Ekstreme stivolaj ili kune suriras la ŝtuparan vojjon, finfine trafante en sak-stratetod.

Tie-tŝi ili alidžas al dense pakita hom-amaso, kiu kolstretŝe direktas orelojn kaj okulojn al aristokrata domo, kie oni stias egziston de granda etadĝosalono. Antaw la dompordo, kaj ankaw destre kaj maldestre disstarantaj, iuj junviroj super la amaso levitaj per podieto alparolas dĝin.

– “Estas adeptoj de la Mesio. Mi rekonas nojn Johani kaj Kefas,” informas Joram.

– “Kaj tie paroladas Jakobus kaj tie Thadeus,” sti-kredas Edisa.

Post patsientsa altrudidĝado prosperas al ili proksimigi sin sufitŝe al unu el la retoristoj. Oni stretŝas la orelojn. Ke hodiaw Konsolanto mal-supred venis de la Tŝielo, verk-ante grandan mirigaĝon, ili awdas proklami. La ditŝiplo finas sian eksponon per peto, ke tŝiuj kiuj kredas je Jesuo, la Sendito de Jehovo, lasu sin bapti en vatro kaj spirito, nome de Dio la Patro, Dio la Filjo, kaj Dio la Santa Spirito!

La publiko estas eksaltita, malpli pro la entuziasmega ardo de la predikistoj, ol pro la miriga fakto ke tŝiu awdas kaj komprenas en sia propra gepatra lingvo, kfazaw la babeltura tawzigo neniam estus okazinta. Tamen kolektatis tie pro la festo multe da gentoj: Partoj, Medoj, Elamidoj, Romenoj, Helenoj, Edĝiptoj, kaj lodĝantoj de Kapadokujo, Pontuso, Fryglando, Pamfylujo, kaj tseteraj regionoj.

– “Tŝu ankaw ni baptatu en vatro kaj spirito, Patsjo?” demandas Edisa, opservante ke tsentoj da awskultintoj prezentas sin.

La frunto de Joram, ne tiel fatsile impresebla, kovridžas per severaj sulkoj.

– “Infanino, tsi ne stias kion tsi diras! Unue du, nun tiuj viroj konfesas tri diojn. Demonaj sortŝistoj ili estas! Venu, sufitŝegas! Ni reiru al la hejmo!”

Kun premata koro Edisa akompanas lin. Ŝi ne trovas vortojn por argumenti. Joram male babilas ledžere. Kfazaw li sentus liberigon el sub peza ŝardžo, kfazaw li estus veninta el nespirebla atmosfero, tiel li kondutas. «La historio pri tiu ŝajnmesio por li estas likfidita,» tsertigas li. Kia sensentsa doktrino, kia abomeninda malsadżetso! Nura homo kiel dua Dio apud Jehovo! Kion mi diris? Jam tria aldonatas! Kie finidżos tio? Morgaw ili probable altrenos kfaran, poste kfinan, kaj pli kaj pli! Kial ne? Ja, kiu unu fojon malaktseptas la Vorton de Jehovo, tiu devas elvoje vagadi. Freneza estis tiu Nazaretano! Freneza estis mi mem, kiam mi defendis lin! Kiu ancoraw kuradżus aserti ke Kajafa misjudżis? Dank-oferon mi deditŝos al la Plejaltulo, Edisa, tŝar Li min liberigis el tiu anatejma herezetso, el la opseĉo de tiu sortŝa Galilujano!”

Tiom grandajn paŝojn faras Joram, ke la knabino apenaw povas tŝeflanke resti. Tamen ŝi jam sufitŝe reaplombidżis por reirigi sian parolkapablon.

– “Tŝu Li do ne estis justulo, Patsjo? Tŝu Li ne verkis multnombrajn miraklojn?”

Joram haltas kaj ŝin admone rigardas. Tiam li turnas sin al la Templo, kie avrumaj kapituloj de la Santejo de la Santejoj alte levas sin.

– “Tie,” diras li, montrante al la honoregata konstruaĵo, tie restadas Justulo, la Sola!”

Ili pašadas plu al sia eksterurba lodžejo, sed la rabeno jam ne parolas kaj mergidžas en pripensojd.

La tutan posttagmezon li restas sur la teraso. Ankoraw li demonstras gajetson al la filjino, kiam li sidigas sin tŝetable por la mandžo, sed al Edisa ŝajnas, ke liaj eldiroj plu ne sonas tiel firmatonaj kiel en la mateno.

– “Tŝu Patsjo tamen plu sertŝus solvon?” ŝi demandas enpense. Tiu nura eventalažo plenigas ŝin per felitŝo.



Tŝirkaw la tria horo de la sekfanta tago ne regas la kutima movidžemo, kiel traditsie okazas post granda festo. Malmulte da pilgrimantoj forlasas la tŝefurbon, eble detenataj de la *pentahemraj eventoj. Tŝio devas esti vigle diskutata por kolekti amason da novažo por la hejmrestintoj; oni devas pripesi por kaj kontraw, avan ol fari personan detsidon rilate la novan bapton; oni devas awskulti la paroladojn kaj starigi demandojn, multajn demandojn pri la Nova Ligo kaj pri la far-otažo; aw... oni devas aws kulti refutojn far-de Altkonsilianoj sur la Temploplatso, por povi arm-izi sin kontraw tiud impetege kreskantad sektod de Galilujanoj.

Tiel-tŝi la elmigro el la urbo estas tiom magra. Eniradas nur sensignifaj grupetoj de kamparanoj, kiuj antawed pelas butŝotan beston aw transportas legomojn kaj fruktojn. Estas ili homoj senstiaj pri la okazintažo, kaj kiuj venas

oferti siajn komertsaĵojn aŭ volas viziti la Templon por tie alporti siajn donatsojn en la dekret-itaj tagoj post la festo.

El la ombro de la pordega arkaĵo paŝas du viroj, palpebrumante pro la blanka brilego de la orienta sunlumo. La pli maljuna estas respektinda viro, kun fortika staturo, digna en irmaniero kaj gestoj, kaj kun severa aspekto de altofitsa Israelido. Lia kunulo movas sin pli sendĝene kaj senzorge. Ties elasta marŝado, videble detenata favore al la akompananto, esprimas freŝan vigletson kaj junan fleksebletson. Volforto, entreprenemo, ja eĉ konkeremo lumas el lia tuta mieno. Foje lia rigardo soras malproksimed, kfazaw li volus vidi trans la horizontod, kie luras agoj, atendas taskoj.

– “Jen la vilao de Joram, kiu defendis nian Majstron en la Synhedro. Apude loĝas la Heleno,” informas la malpli juna.

Tŝe Filok ili frapas. La skulptisto ilin aktseptas kun estsepta elmontrito pri felitŝo:

– “*Rabi Nikodem*, via denova vizito eksterordinare honoras min,” diras li, profunde riverentsante. “Kaj kiun mi bonvenigu kiel vian noblan akompananton?”

– “Jakobus, ditŝiplo kaj parentso de nia Sinjoro kaj Majstro Jesuo,” komunikas la rabeno.

Filok iom rudĝidĝas pro tiuj paroloj; tiel plenigas lin respekto antaŭ la nova vizitanto.

– “Mi salutas vin, Filok, per la bondeziro de nia Majstro: la Sinjoro estu kun vi!” diras Jakobus siavitse kun senartifika afablo, kaj li amike ŝultrofrapetas la junan viron. “*Rabi Nikodem*

entuziasme parolis al mi pri via artoverkažo,” dawrigas li, “pretsipe pri statuo de nia karmemora Majstro je la Krutso. Estus por mi granda favoro povi tiun vidi.”

Filok dĵojas. Senprokraste li turnas sin kaj, konsiderante ke la vizitantoj havos skrupulon eniri lian paganan domon, li trenas la krutsobildon dĵis en la pordejo.

Kfiete kaj atente Jakobus dĵin rigardas. Larmo sur unu lia vango baldaw malkaŝas ke la porprezentaĵo profunde emotsias lin. Li murmuras kelkajn parolojn, inter kiuj distingeblas 'Majstro', sed li ne fleksas la genuojn nek ekster-igas iun ajn el siaj sentoj.

– “Tŝu vi adoras tiun-tŝi bildon?” demandas li, turnante sin al la artisto.

– “Ho, ne la ŝtonan figuron mi adoras, sed Lin mem, la Porprezentaton!” ripetas Filok, per la paroloj kiujn li awdis de Edisa.

– “Bonfarate!” opinias Jakobus.

Nun li aliras la krutson kaj respekte kisas unu el la najl-izitaj manoj.

– “Tŝu vi kredas je Jesuo, Filjo de Dio, Savanto de ni tŝiuj?”

– “Mi kredas je Li kiel je l'unika Dio!” atestas Filok.

– “Tiukaze vi tserte deziras peristsison kaj bapton en la Nomo de Patro, Filjo, kaj Santa Spirito?”

– “Tion mi efektive deziras,” deklaras Filok. “Sed...” li haltas kfazaw pro subita krompenso. Sed tiam li formizas detsidon. “Vi parolas pri Patro kaj Filjo kaj pri Santa Spirito. Tŝu tio faras tri Diojn?” stivolegas li.

– “Ne, amiko, ne tri Diojn, sed tri Personetsojn, kune nur unu Unika Dio.”

Filok volas ancoraw aldoni ion, sed la paroloj restas malantaw liaj lipoj. Li rigardas al la teraso de sia najbaro kaj rimarkas non Joram, opservanta ilian grupeton. Eke li kuras for; sturmas supred la eksteran ŝtuparon de la vilao.

– “*Rabi !*” krias li eksitite. “Tŝe mi estas iu parentso de la Mesio; tiu havigas klarigon pri Patro kaj Filjo en unu sola Dio! Venu, venu, kaj awskultu kion li diras! Venu, venu do!”

Joram ne tre volontas, sed la arda entuziasmo de la juna artisto finfine venkas lian reziston. “Nu jes, mi volas iom konversi kun Nikodem,” li trompas sin mem, irante malsupred.

Awdinte la vokojn, Edisa ankaw alvenas kaj sekfas ilin al la metiejo. Tie, antaw la nun fermita pordo, vikle interparolas Nikodem kaj la apostolo. Tiel intense Jakobus kontsentras sin je tio kion li volas ekspliki al la egzegezisto, ke li etŝ ne rimarkas la nove venintajn.

– “Por fondi spiritan regnon de la Di-infanoj, tiutsele la Mesio aperis surtere. Tian taskon nur la Sinjorego de la Tŝieloj mem stipovis plenumi. Kaj tial Li sendis Sian Propran Filjon, unu Dio kune kun Li!” Tion Joram awdas klarigi.

Unuamomente li dŝoje surprizidŝas, trovi sian propran tezon pri 'spirita regno' tiel klare ekspodata, sed tŝe la tseteraj frazoj li sen invito atakas, firmdetsidita kontrawbatali tiujn malŝategindajn pretendojn.

– “Vi asertas «unu Dio»” krias li, “sed nomizas du:

Patro kaj Filjo! Kaj kiel povas Dio, estante absoluta Spirito, havi materian filjon!?”

– “Mi ne nomizis du diojn,” ripostas Jakobus, “mi nomizis du Personetsojn, unu law naturo.”

– “Kiel ti-kaze la Patro povas esti en la Tŝielo, dum la Filjo vagas sur Tero?”

– “Sur Tero estis la Filjo kun Sia alprenita homa naturo, kaj en la Tŝielo, samkiel surtere, per Sia eterna dia naturo.”

– “Kiel vi povas nomizi du sampsajajn estulojn nur unu?”

– “Ili ne estas du sampsajaj Estuloj; ili estas ununura Entito: havas ambaw kune unusolan dian naturon. Nur en Sia hometsa realigo la Filjo havas alian naturon.”

– “Ion tian Jehovo neniam inspiris al la Profetoj!”

– “En tio vi pravas, Majstro. Estas džuste tial, por pliigi nian konon pri la Eternulo, ke la Filjo tion instruis; Li, Kiu estas la vero personigita: «Mi kaj la Patro estas Unu. Mi estas en Mia Patro, kaj Mia Patro estas en Mi,» deklaris Li. Kaj ancoraw: «Tŝion, kion havas la Patro, ankaw Mi havas. Kiu vidis Min, vidis la Patron.» Kaj plie: «Tŝio kion faras la Patro, tion same faras la Filjo... Kiu ne honoras la Patron, ne honoras la Filjon.» Tiumaniere do egzistadas en la sama, unika, ne dividebla Naturo: Patro kaj Filjo, kaj ident-nature kun Ili la Santa Spirito, promesita al ni de la Mesio, por malkaŝi al ni tŝion nun ancoraw mank-antan, kaj efektive hieraw Sin manifestinta. Kaj pro tio la Majstro ordonis al ni bapti nome de Patro, Filjo, kaj Santa Spirito.”

– “Tion mi tute ne komprenas!”

– “Kiu kapablas plene kompreni Dion? La Mesio bone stiis ke karno kaj sango ne povas riveli tiun Superan Misteron al ni, sed nur la Tŝiela Patro. Tial Li postulas de ni sole nur animstaton, egalan al tiu de senartifika, humila, kaj obeema infano, kaj ankaw fidantan kredon.”

– “Tian instruon mi neniam awdis el Lia buŝo!”

– “Džin awdis la ditŝiploj, kiam Li foje diris: «Kiu ne aktseptas la Dian Regnon kiel infano, tiu džin ne eniros!» *Rabi Joram*, mi divenas: la Sinjoro atendas de vi nur la butŝ-oferon de via homa intelekta fiero, por donatsi al vi Sian lumon, tŝar via koro sendube jam sentas la veron. Tŝu la Majstro mem ne diris iam al vi: «Vi estas ne malproksima de la Dia Regno»? Eble ancoraw mankis al vi sole nur: idži tia kia infano.”

– “Kia infano...?” ve-spiras *Joram*, klinante la kapon. Ne, kiel fidema infano li ancoraw neniam aliris la Mesion. Per sia granda analizopovo kaj sia vasta egzegezista eruditetso li tŝion volis venki, enpenetri, posedi. Tiuj kapabloj ja puŝis lin tŝiam pli proksime al kompreno de la Estimegato, sed infan-anima sindono, ne, tiun li neniam konsideris. Kaj džuste tiu, law la apostolo, estus supera rimedo por la granda spirita kontakto, al kiu li enfunde aspiradis. Tion li klare pertseptas hodiaw. Filok kaj Edisa havas tiun bezonan animstaton; kaj ankaw Josef kaj Nikodem, sendube. La *sersoparimitaj ditŝiploj kredeble etŝ nadžas en dži. Kaj ili suktsexis aktsepti etŝ plej nekred-eblajn aferojn!

Dum *Joram* staras tie en profundaj pensoj, Edisa

kaj Nikodem opservas lin kun avida espekto. Filok reiris en siad laborejod. Jakobus siaflanke faldis la manojn kaj predžas, kun okuloj direktitaj al la tŝielo.

– “Petu vi de via Majstro por mi la netsesan spiritan staton!” fine turnas sin Joram al la apostolo. “Mi ne sti-povas!”

En tiu sama momento Filok reaperas sur la sojlo. “Tŝu vi rifuzos konfidon al Tiu, Kiu mortis por ni en superaj memforgeso kaj amo?” li demandas al la rabeno.

Kaj flanked paŝante li subite aperigas antaw tŝies okuloj la krutsobildon. En spontana reago Joram volas forturni sin; sed jam lia rigardo renkontis tiun de la Krutsifito. Katenita li staras. Liaj okuloj lardže grandidžas, liaj lipoj neregeble tremas.

Longe li restas en tiu stretŝa pozo. Kiu povos priskribi la sentojn tumultantajn en lia koro? Tŝu estas nevideblaj lumradioj el tiuj trankfilaj, al-luraj okuloj de la Sufereganto, kiu prilumas lian tserbon, heligante la enigmajn profetažojn pri butŝota ŝafido? Tŝu estas tiuj etenditaj brakoj, kiuj moligas lian opstinan reziston, mergante du volojn en unusolad? Tŝu Joram sentas flui la kor-sangon de la Mortanto en liad proprad korod, kun alporto de nekonata spirita doltŝego, transformizante sin en amod? Tŝu estas la spasme kurbigitaj genuoj de la Savanto, kiuj emigas la liajn al adorado? Aw tŝu estas la pendanta kapo, kiu subed puŝas lian propran kapon en sinteno de pentanta, humila infano?

Kiu povos pentri kiumaniere la Viro de Doloroj favorigas la animon de tiu senmova rabeno?

Subite la mieno de la spektanto malstretŝidžas kaj est-idžas serena, kfazaw varmeta venteto forblovis de dži frostan nebulon, profunde korduŝante la tŝirkawstarantojn. Ili vidas non Joram malrapide etendi la brakojn; ili vidas lin surgenuigi sin kaj tiele rampi al la piedoj de la Krutsifito.

Kelke da momentoj li restas en tiu pozo. Tiam li levas la okulojn al tiuj de la Suferanto, malrapide dirante:

– “Pro kio mi ancoraw esploru kaj argumentu, ho, krutsif-ita Mesio? Mi frakasidžas sub la potentsego de Viaj vero kaj korfavoro; jes, sub la vivanta potentsego de Viaj liberigaj vero kaj kompatema korfavoro; ho, mia Sinjoro kaj mia Dio!”

Li restarigas sin kaj, simpletse kiel infano, li demandas al la apostolo:

– “Kion mi devas fari?”

– “Lasu bapti vin nome de Patro, Filjo, kaj Santa Spirito,” respondas Jakobus.

– “Ni do iru kaj faru,” diras Joram.

Kaj dum ili tŝiuj kune iras kied la apostolo ilin gvidas, Joram ekkaptas manon de Filok:

– “Mia frato vi estas, Filok, kaj mia proksimulo, tŝar infano de la sama Dio! Mia patro vi estas, Filok, patro de mia nova vivo! Kaj mia filjo vi povas idži, se vi deziras, ho Filok – mia filjo!”

Kaj li kisas la junviron surfrunte.




= **FINO** =

***Novaj terminoj**

daja sadvo	=	mizerikordo
KWO-	=	malo de FI-
Penta hemro	=	Pentekosto
sers o parimo	=	privilegio

Palestino en la tempo de Jesuo Kristo





Felix Persoons (1892-1972)
estis flandra instruisto kaj pos-

te direktisto de lernejo por estontaj instruistoj. Sotsie tre agema kaj sindeditŝa, li anis en multaj kulturaj kaj bonfaraj asotsioj, aw tiujn gvidis.

Siajn pedagogikajn spertojn kaj printsipojn li esprimis ne nur en instrulibrooj sed ankaw en formo de ŝatataj rakontoj kaj romanoj, pretsipe tiaj por infanoj.

Estante konvinkita kaj pia Kristano, li verkis ankaw plurajn historikajn romanojn tŝirkaw Jesuo, profunde studinte ne nur la Bibliion sed ankaw la historikon kaj morojn de la iama Judaro.

Inter tiuj verkoj pri bibliaj temoj, li mem opiniis la romanon “Joram” sia enhance kaj beletre plej suktses-inta laboraŝo.